FABELOJ DE LA VERDA PIGO

KOLEKTITAJ DE LOUIS BEAUCAIRE

TK / STAFETO

90 6336 20 7

Verkita en Esperanto

La verda pigo de la kovrilo *(pica viridis esperantista)* estas donaco de la franca desegnisto Jean EFFEL al Caroline BEAUCAIRE kaj al la ceteraj infanoj de la tuta mondo. Dankon, oĉjo EFFEL.

D/1981/2639/2

Presita en Belgio de la eldonejo

FABELOJ DE LA VERDA PIGO

Kolektitaj de Louis Beaucaire
kaj
ilustritaj de Stano Markovič

Antverpeno — La Laguna

ANTAŬBABILO

Saluton, karaj infanoj! Sidiĝu en la herbo kaj streĉu la orelojn. Ha! kiel bonŝancaj vi estas, hometoj! Vi povas iri en la lernejon, legi librojn, rigardi la televidon kaj tiamaniere amasigi mil sciojn necesajn por viaj venontaj jaroj.

Verdire, mi ne plendas pri mia piga sorto. Male. Mi spertis multon dum mia longa vivo. Mia avo naskiĝis en pola arbaro kaj lernis Esperanton de klera onklo loĝanta en Bjalistoko. Mia patro, migrema birdo, konatiĝis kun mia patrino en via bela vojevodio. Tie, meze de vepro, mi iam elrampis el verde bruna ovo kiel denaska esperantista pigo. Mia patro volonte raportis pri siaj vojaĝoj kaj vespere mia patrino rakontis al mi fabelojn.

Jam de longe mi nestas supre de ĉi tiu poplo, ĉirkaŭ kies trunko vi nun sidas, por aŭskulti mian babiladon. Iafoje min vizitas miaj kuzoj, la saĝa Lanio, kiu studis la filozofion en Ateno, kaj Hematopo, kiu kolektas klaĉojn laŭlonge de foraj plaĝoj. Tiel mi informiĝas pri ĉiuj gravaj okazaĵoj en la vasta mondo.

Krome mi ofte paŭzas sur branĉo de platano, meze de la lerneja korto. Kiam la suno brilas, la fenestroj estas malfermitaj, kaj mi parkerigas ĉion, kion via instruisto, s-ro Rojelo, provas enkapigi al vi pri gramatiko, geografio, historio, poezio, muziko... Jes, mi eĉ kapablas kanti, eble ne tre melodie pro mia aĝo, sed sufiĉe raŭke por plaĉi al la moderna junularo. Tio cetere klarigas mian alnomon. Kutime pigo estas nigra kaj blanka, sed neniam verda, ĉu jes? Nu, pro miaj lingvaj konoj, oni petis min partopreni en la Arta Vespero de la 44a Universala Kongreso. Tie mi tiel emocie kantis la tri strofojn de la Himno, ke oni rekompence donacis al mi jenan verdan stelon tajlitan el bela imitaĵo de smeraldo. De tiam la homoj nomas min

la verda pigo

ENHAVO

1. La milito de la ĉapeloj 9
2. La revisto 15
3. Samideano lupo 25
4. Malaperis la facila vento 35
5. La bona feino Amenta kaj sinjoro Akuku 43
6. La verda puno 51
7. La eta poeto kaj la lokomotivo 61
8. La kapaŭskultiloj 71
9. La ribelema kruro 77
10. Zozo, la deksepa regulo de la Fundamento 83
11. La lingvo interplaneda 93
12. La stranga historio de Notulas 101

LA MILITO DE LA ĈAPELOJ

FOJE reĝo rigardis sin en spegulo, kiel ĉiumatene post la razado. Rimarkinte ion, kion li ĝis tiam neniam rimarkis, li sonorigis al la ĉambelano.

— Via reĝa moŝto vokis min.

— Jes, alproksimiĝu kaj staru apud mi antaŭ la spegulo.

La ĉambelano miris pro la nekutima ordono.

— Sinjoro ĉambelano, ĉu vi rimarkas ion?

— Kion mi rimarku? Via reĝa moŝto estas pli granda, pli bela, pli majesta, pli...

— Tatata! Rigardu bone.

— Mi rigardas.

— Ĉu vi ne vidas, ke vi, simpla ĉambelano, havas sur la kapo la saman ĉapelon kiel mi?

— Se via reĝa moŝto ordonos tion al mi, mi tuj deprenos mian ĉapelon, sed poste mi estos nur cambelano.

— Ne temas pri tio. Konservu vian simplan ĉapelon. Ĉu tamen ne decus, ke mia propra kapo estu pli lukse vestita ol via? Bonvolu venigi la prezidanton de la Akademio.

Malgraŭ siaj reŭmatismoj la prezidanto de la Akademio galopis al la reĝa palaco.

— Via reĝa moŝto vokis min.

— Jes, sinjoro prezidanto. Bonvolu sidiĝi kaj diri al mi, kiel vi skribas la vorton "reĝo".

Balbutante, la Akademiestro literumis:

— Ro - e - ĝo - o.

— Kio estas super la tria litero?

— Super la tria litero estas supersigno, via reĝa moŝto.

La regnestro rikanis:

— Supersigno! Kiu inventis tiujn supersignojn?

— D-ro Zamenhof, via reĝa moŝto.

— Ĉu vi ne opinias, ke D-ro Zamenhof iel neglektis la hierarkion?

La prezidanto de la Akademio malfermis la buŝon kaj rigardis sian suverenon per mirrondaj okuloj. La reĝo ekkriis:

— Malbenita estu la Fundamento, kiu donis al reĝo simplan ĉapelon anstataŭ krono! Ĉu vi aŭdas, sinjoro prezidanto? Mi postulas mian kronon. Bonvolu do transdoni al ĉiuj presistoj de mia lando jenajn ordonojn:

1e: De nun oni skribu la vorton "reĝo", uzante kronon anstataŭ simpla supersigno.

2e: Oni uzu du kronojn por la titolo "reĝa moŝto".

3e: Oni uzu iom pli malgrandan kronon por la vorto "reĝino".

La prezidanto de la Akademio riverencis tri fojojn kaj eliris el la palaco. Ne domaĝante siajn reŭmatismojn, li vizitis ĉiujn presistojn de la regno, por konigi al ili la reĝan dekreton.

Oni devis kompreneble fandi novajn tipojn, sed ĉiuj korteganoj akordiĝis, por laŭdi la bonguston de la reĝo kaj trovi la novajn librojn duoble interesaj.

Kiam oni lanĉas modon, multaj homoj volas imiti ĝin. Subite, krom pulĉinelo, kiu opiniis sian konusan ĉapelon belega, neniu estis kontenta pri sia supersigno:

Volis
la ĝardenisto pajlan ĉapelon,
la ŝipisto maristan ĉapon,
la ĵurnalisto kvadratitan kaskedon,
la ĉambristino puntan kufon,
la ĝendarmo militistan kepon,
la ĉampano korkon,
la ĝemelo du supersignojn,
la ĵonglisto tri aŭ kvar...

La libroj ĉiam pli beliĝis, sed la laboro de la kompatindaj presistoj fariĝis tiel komplika, ke pluraj preferis ŝanĝi la metion, antaŭ ol freneziĝi.

La prezidanto de la Akademio deklaris, ke li rezignos sian oficon, se oni plu tedos lin per tia bagatelo. Oni memoru, ke tiu

kroma laborado perdigis al li la lastajn tri harojn, kiuj konsistigis lian propran kapornamaĵon.

Ve, la unuavide nur supraĵa tumulto degeneris en klasbatalon kaj eĉ en intercivitanan militon, kiun la historiistoj nomis "la milito de la ĉapeloj".

En ĉiuj presejoj de la lando la 22 malriĉaj literoj rifuzis kunlabori kun la 5 riĉaj ĉapelitaj literoj. Ili strikis kaj manifestaciis surstrate kontraŭ la aroganteco de la burĝaj literoj. Ĉi tiuj rimarkigis, ke ili ne kulpas pri sia nobela denaskiteco, kaj ke ili estas nemalhaveblaj por la bona funkciado de la socio. Sufiĉas ja rigardi la ruĝajn afiŝojn de la ribeluloj: "Abocoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!". Oni devas vole nevole uzi supersignojn. Maldekstraj intelektuloj provis pruvi, ke oni povas verki proletajn skribaĵojn sen supersignoj, kaj la ruĝaj afiŝoj poste tekstis: "Abocoj el la tuta mondo, unuigu viajn fortojn!".

La aŭtoroj de detektivaj romanoj kaj la gazetistoj protestis, ke oni ne rajtas trudi al ili tian ĵongladon. La intelekta vivo stagnis, sed neniu tendaro volis cedi. La situacio difektiĝis ĉiutage iom pli. Okazis kio devis okazi: terura batalo. De sur la plej alta branĉo de mia poplo mi observis per lorno la movadojn de la korpusoj en la ebenaĵo. Pezaj pafaĵoj hajlis el la linio de la nombre superaj senĉapeluloj: "fiuloj - banditoj - kruduloj - abomenuloj -murdistoj!". La atakitoj rezistis, firme tenante super si siajn supersignojn kvazaŭ militistajn kaskojn. Kiam ili kontraŭatakis, sangajn vundojn kaŭzis al la simpluloj la akraj sagopintoj de la cirkumfleksitaj insultoj: "aĥ - fuŝuloj - sovaĝuloj - aĉuloj - apaĉoj!".

La sorto de la batalo restis nedecidita. Vespere la presistoj devis bandaĝi kontuzojn, tuberojn kaj rompojn de multaj difektitaj literoj.

Por venki tiun ribelon, la reĝo ordonis dungi fremdajn literojn el Francujo, Ĉeĥoslovakujo kaj aliaj barbaraj landoj posedantaj strangajn, minacaspektajn literojn.

Aŭdinte tion, la prezidanto de la Akademio kunvenigis la hieraŭajn malamikojn kaj per kortuŝaj paroloj petegis ilin forgesi sian sterilan kverelon kaj solidariĝi kontraŭ la invadantoj:

— Karaj alfabetanoj, vi formas unu grandan rondon familian, en kiu ne estas riĉaj kaj malriĉaj, belaj kaj malbelaj literoj, sed nur egalaj kunuloj. Gravas ĉiu el vi, kun aŭ sen ĉapelo. Supersignoj ja ne estas frivola galanterio, kiel volis kredigi al ni la reĝo, sed iloj nepre necesaj por la internacia kompreniĝo.

Tondra aplaŭdo substrekis tiujn ardajn vortojn. La literoj lo, i, bo, e, ro kaj a kriis:

— For la tirano!

Ĉiuj kunkriis:

— For! Vivu la demokratio!

La saman tagon la reĝo fuĝis eksterlanden kun sia luksa supersigno sub la brako. La prezidanto de la Akademio fariĝis prezidanto de la respubliko, kaj de tiam la literoj de la Esperanta aboco senĉese kunverkas belegajn tekstojn, antaŭ kiuj la tuta mondo respekte kaj admire demetas la ĉapelon.

LA REVISTO

FOJE viro vendis revojn. Hodiaŭ nur kelkaj maljunaj poloj memoras rakontojn de siaj gepatroj pri tiu stranga komercisto. Ankaŭ mia avo ofte vidis lin migri inter Varsovio kaj Bjalistoko kun granda sako sur la dorso.

Tiam oni renkontis ĉiusezone tiajn kolportistojn, kiuj proponis al la kamparanoj perlamotajn butonojn, puntajn rubandojn, buntajn almanakojn, kontrabandan tabakon kaj mil aliajn rarajn ojn.

La revovendisto male ne transportis tian miksamason en sia sako. Li vendis nur revojn. Vi demandas, karaj infanoj, kiel aspektas revoj, ĉu oni povas ilin kolekti, ordigi, konservi kaj vendi kvazaŭ terpomojn aŭ galoŝojn. Mi konfesas, ke via demando iom embarasas min, ĉar mi mem neniam vidis kolportiston eltiri revojn el sia sako. Mia piga fantazio igas min tamen supozi, ke revo estas aĵo ŝanĝiĝema kiel nubo kaj knedebla kiel argilo. Ĝi sendube iel daŭras pli malpli longe, kiel la stangeto de ĉokolado, kiun vi, Peĉjo, nun sukas kun plezuro.

Ridu, infanoj, ridu, sed certe estas, laŭ la raporto de mia patro, kiu aŭdis tion de mia avo, ke la feliĉaj homoj loĝantaj inter Varsovio kaj Bjalistoko tiutempe povis aĉeti ĉiajn revojn.

Neniu konis la nomon de la kolportisto. Por ĉiuj li estis nur la revisto. Kuris la famo, ke li devenas de nobela familio infektita de la ideoj de la Franca Revolucio. Li ofte anoncis prosperajn tempojn, en kiuj regos libereco kaj egaleco. Kaj li nomis ĉiun homon frato aŭ fratino.

Kutime la revisto alvenis dum la tagmanĝo. Li lokis sian sakon en angulo de la ĉambro kaj akceptis teleron da varma supo, kiun oni ĉiam proponis al li. Li raportis novaĵojn el foraj vilaĝoj, informiĝis pri la rikolto kaj prognozis la morgaŭan veteron. Poste

oni deprenis la manĝilaron, kaj li garde metis sian multevaloran sakon sur la grandan tablon.

— Nu, gefratoj, kiajn revojn mi vendos al vi hodiaŭ?

La patro gratis sian nukon:

— Se mi posedus du novajn ĉevalojn, tio ege helpus mian laboron. Sed eble pli utilus tridek bovinoj en la paŝtejo.

— La revo pri ĉevaloj kostas kvindek kopekojn, la revo pri bovinoj sesdek kopekojn. Donu al mi unu rublon, kaj vi havos ambaŭ revojn.

La patrino bezonis sanon por la tuta familio kaj tri ŝrankojn plenajn de tolaĵoj. La deksepjara filino sopiris pri baldaŭa edziniĝo al la amata Johano. La unua filo deziris keston ŝtopitan per ĉiaj ludiloj: globetoj, ŝtonĵetilo, buntaj bildoj, stanaj soldatoj kaj precipe ligna ĉevalo, vi ja scias, tia ĉevalo sur kiu oni povas sin balanci dum du horoj. La alia filo postulis vojaĝon al Ameriko, kien elmigris onklo Vlaĉjo.

Ridetante, la revisto eltiris ĉies revojn el sia trezorujo.

— Jen, frateto, revo pri Ameriko por dudek kopekoj. Nur dudek kopekojn entute kostas tiu revo entenanta veturon al la haveno, unu semajnon sur blanka vaporŝipo, admiro de grandaj domoj tuŝantaj la nubojn, kaj fine rajdadon sur ĉevaloj pli rapidaj ol la norda vento.

Oni sciis, ke la revisto ne revenos antaŭ pluraj monatoj. Oni volonte pagis tri rublojn kaj tridek kopekojn. Tiu sumo estas ja modera prezo, se oni konsideras, ke tuta familio povos longe revadi pri novaj bovinoj, nova edzo, nova ŝtonĵetilo kaj nova transoceana vivo.

Fine la revovendisto surŝultrigis sian kolportistan sakon kaj afable adiaŭis siajn gastigintojn.

— Ĝis revido, gefratoj. Mi rapidu, ĉar multaj homoj atendas min.

Efektive, vidante la reviston aperi ĉe angulo de arbaro aŭ sur la herbeja vojeto, la kamparanoj ĉesis la laboron kaj ĝoje kuris al li.

— Saluton, revisto. Kion vi havas por mi en via sako?

— Kion vi bezonas, frato?

La kolportisto atente aŭskultis la dezirojn de la viroj, de la vir-

inoj, de la infanoj. Por ĉiuj li tuj disponis revojn, ĉar jam de longe li spertis, ke la homoj ĉie sopiras al la samaj bonoj: sano, amo, amikeco, paco, longa vivo, sufiĉe da mono...

Ankaŭ urbajn bazarojn kaj foirojn vizitis la revisto. Li eksponis siajn feliĉilojn meze de verda tuko sternita sur trotuaro, sub granda ruĝa ombrelo. Kiel la apudaj vendistoj, li laŭte alvokis la pasantojn:

— Haltu, fratino! Plibeligu vian ĉiutagan vivon. Revadu. Jen revoj por vi, ĉiaj revoj. Avinjo, nur kvardek kopekojn kostas revo pri la pasinteco.

La maljunulino ridetis, pagis kaj foriris, memorante pri milda sezono, en kiu ŝi, bela knabino, kuris sub florantaj pomarboj, dancis kun siaj amikinoj, petolis kun la junuloj. Printempo. Printempo senfina por kvardek kopekoj...

Okazis, ke la revisto perdis la paciencon aŭ eĉ koleris, kiam homoj petis de li malnoblaĵojn aŭ malhonestaĵojn. Ekzemple iam alproksimiĝis iu riĉulo vestita per multekosta peltaĵo. Por amuzi la gapulojn starantajn ĉirkaŭ la ruĝa ombrelo, li arogante demandis:

— Brokantisto, ĉu vi havas en via sakaĉo revon pri posedo de tuta regiono? Mi dezirus pligrandigi mian bienon per la agroj de miaj najbaroj.

La okuloj de la revisto ekfulmis. Li kraĉis teren kaj respondis kun naŭzita mieno:

— Sinjoro, mi ne povas vendi al vi tian revon, ĉar viaj najbaroj mem, kiuj sopiras al egaleco kaj frateco, ofte petis de mi revon pri via baldaŭa enterigo.

Sakrante, la bienulo forrapidis sub laŭta mokado de la homamaso.

Por la fino de mia historio mi rezervis al vi, karaj infanoj, la plej belan epizodon de la vivo de la revisto. Ĝi okazis antaŭ multaj, multaj jaroj, sed mia patro tiel ofte ripetis tiun rakonton de mia avo, ke mi ankoraŭ hodiaŭ memoras ĉiujn detalojn.

La jaro 1878 proksimiĝis al sia fino. Neĝis. Tra la malplenaj stratoj de Varsovio la revisto paŝis kun sia sako sur la dorso. Neniu kliento haltigis lin, sed la kolportisto kutimis je sia sorto, kiu

trudas al ĉiuj kolportistoj senĉesan vagadon renkonte al la printempo. En la Nowolipie strato li iom paŭzis antaŭ granda domo, demetis siajn gantojn kaj blovis sur siajn fingrojn. En tiu momento frapo sur vitron altiris lian atenton. Fenestro malfermiĝis kaj voĉoj vokis lin:

— Sinjoro revisto, eniru kaj varmiĝu apud ni.

Li hezite trairis la ĝardenon antaŭ la domo. Ses aŭ sep junuloj en lernejaj uniformoj bonvenigis lin kaj kondukis lin en salonon, kie brulis kandeloj. Gimnaziano diris:

— Sinjoro revisto, la ĉielo sendis vin al ni. Demetu vian mantelon, sidiĝu kaj manĝu pecon de ĉi tiu torto, kiun la bona sinjorino Zamenhof bakis por ni. Ŝia filo Ludoviko fariĝis deknaŭjara antaŭ du tagoj. Sed ankoraŭ pli gravan eventon ni festas hodiaŭ. Ludoviko inventis lingvon universalan. Longe vivu nia genia Ludoviko!

Ludoviko ŝajnigis indignon:

— Aleksandro Waldenberg, vi estas senhonta flatulo. Kiu scias hodiaŭ, ĉu nia "Lingwe Uniwersala" iam konkeros la mondon?

Dekjara knabo kriis per akuta voĉo:

— Certe, frato, certe. Aleksandro pravas. Ni kune rekantu "Malamikete de las nacjes", por montri al la revista moŝto, kiel bele sonas via nova lingvo.

Ludoviko milde admonis sian frateton:

— Silentu, Felikso. Via babilado tedas nian gaston.

La revisto levis manon:

— Tute ne. Via afero ege interesas min. Unu lingvo por ĉiuj homoj, tio estas unika revo, kiun ĝis nun neniu petis de mi.

Aleksandro Waldenberg demandis:

— Ĉu vi havas tian revon en via sako? Mi tuj ĝin aĉetos kaj donacos al mia amiko Ludoviko. Espereble ĝi ne estos tro multekosta.

La kolportisto pacience maĉis sian pecon da torto kaj post silento murmuris:

— Fratoj, la tuta oro de la tero ne sufiĉus, por pagi ĝin. Jen, prenu vian belan revon kaj diskonigu ĝin al la ceteraj homoj. Nun mi foriru, ĉar restas ankoraŭ kelkaj revoj en mia sako. Bonvolu

danki la dommastrinon pro ŝia bona kuko.

Poste la revisto malaperis por ĉiam. Neniu scias, kie kaj kiam li mortis.

Dum longaj jaroj Lazaro Ludoviko Zamenhof poluris sian praan gimnazianan lingvon, kiu fine fariĝis nia bela Esperanto. Li tiel penege laboris por ĝia disvastigado, ke ankaŭ li mortis tro frue.

Sed lia revo vivas plu kaj iam nepre efektiviĝos.

SAMIDEANO LUPO

FOJE estis lupo nomata Izenverdo, kiu parolis Esperanton kaj vivis en la arbaro, vi ja scias, en la granda arbaro limanta la ebenaĵon oriente de la vilaĝo.

La hakistoj kaj la karbistoj rakontis, ke iafoje ili vidas teruran beston kun longaj dentoj kaj brilaj okuloj. La avinoj rememorigis pri simila kruela estaĵo, kiu antaŭ multaj jaroj formanĝis knabineton loĝantan en la domo plej proksima al la arbarorando. La sorto de tiu kompatinda viktimo tiel impresis la ceterajn infanojn, ke ili promesis neniam iri solaj for de la hejmo. Dum la bela sezono la familioj kiuj dimanĉe promenis en la arbaro, por kolekti konvalojn, fragojn, frambojn aŭ fungojn, kutime ne transpaŝis la maldensejon de la Granda Fago. Tiam Izenverdo, maljuna klera fraŭlo, diskrete retiriĝis en sian ermitejon, por mediti pri la homa malico. Vintre la arbaro ebligis al la lupo longajn vagadojn inter kverkoj kaj betuloj kaŝantaj siajn piedojn sub mola neĝa kovrilo. Tie ĉi kaj tie Izenverdo helpis malsanan cervon aŭ vunditan kapreolon fini sian suferplenan vivon. Pro tiu tasko destinita de la naturo la homoj nomaĉas la lupon kruela besto.

Pri tia akuzo mi konversaciis kun Izenverdo, kiam pasintan februaron ni hazarde renkontis nin ĉe la arbarorando. La lupo aspektis kiel osta markizo el Abruzoj. Kuntirante sian ŝultran felon, Izenverdo diris al mi:

— Kara pigo, vi scias, ke mi apartenas al malnova itala nobela familio. Fama praulino de mi nutris Romulon kaj Remon. Bedaŭrinde ne dankemaj estas la homoj.

Mi suspiris:

— Samideano lupo, tion mi ofte spertis.

— Feliĉe mi studis la antikvan filozofion.

— Mi aŭdis, ke vi parolas latine pli bone ol kardinalo.

La lupo humile ridetis:

— Jes, mi multe legas la filozofojn en mia solejo. Saĝuloj kiel Seneko kaj Mark-Aŭrelio konsolas min pri la kalumnioj de la vulgaruloj. Ĉu ne estas skandale, ke la homoj atribuas al ni bestoj siajn malbonajn ecojn? Ili nomas stultulon azeno, timemulon leporo, perfidulon vulpo, malpurulon porko. Vi pigoj ŝtelas, ni lupoj murdas. Kaj, hi hi, lasu min ridi, malbonaj esperantistoj krokodilas.

— Dum la lasta kongreso mi provis pruvi, ke ni pigoj ne estas ŝtelemaj, sed nur kolektemaj. Tiuteme mi inside menciis mian kuzon Lanio el Ateno, kiu ofte koleras pri ĉiuj artaĵoj rabitaj el Grekujo kaj senhonte eksponataj en alilandaj muzeoj.

— Ha, verda pigo, vi almenaŭ rajtas ĉeesti en kongresoj. Sed imagu la efekton, se lupo iam aperus en kongresa akceptejo. Mi ofte demandas min, kial mi lernis Esperanton.

— Samideano, tiel vi povas konversacii kun mi kaj legi la Esperantan literaturon.

Izenverdo moke grincis:

— La Esperanta literaturo estas preskaŭ tiel magra kiel mi. Ba, ne en unu tago elkreskis Kartago.

— Ĉu citaĵo de Seneko?

— Ne, proverbo de Zamenhof.

Mi ekkriis mian admiron pri tiel vasta kulturo. La ermito modeste levis la ŝultrojn, reenŝovis ilin en sian eluzitan pelton, afable adiaŭis min kaj malaperis post rubusa vepro.

Karaj infanoj, mi longe raportis pri la lupo Izenverdo ne pro mia natura piga babilemo, sed por ke vi bone komprenu la daŭrigon de mia rakonto.

Antaŭ ses aŭ sep jaroj mi konis knabeton, kiu iafoje vizitis miajn poplajn kunvenojn kun siaj kamaradoj. Lia nomo estis Aleksandro. Ĝuste kiel vi faras hodiaŭ, li sidis en la herbo, sed li ne estis tre atentema. Anstataŭ aŭskulti miajn historiojn, li rigardis papiliojn flirtadi aŭ li absorbiĝis en la skulptado de aveluja bastono. Ankaŭ la lernejaj lecionoj de s-ro Rojelo ne interesis Aleksandron, eĉ ne la Esperanto-kurso. Tion oni tuj rimarkis pro lia malbona sciado de la Lingvo Internacia.

Iam li decidis ĝui belan printempan posttagmezon, vagante laŭlonge de la arbarorando. Li kaŝis sian tornistron en fosaĵo kaj rigardis sciuron petoli sur branĉoj de kverko. Por sekvi ĝiajn amuzajn kapriolojn, nia Aleksandro, hororo!, penetris en la arbaron. Liaj gepatroj tamen tiel ofte ripetadis: "Aleĉjo, neniam iru sola en la arbaron. Tie estas granda lupo, kiu manĝus vin". Sed Aleĉjo tute forgesis la gepatrojn. Tiom da aferoj distris lin:

pego morsis lian alvenon — tak tak,
formikoj procesie krablis al sia fora konservejo — paŝ paŝ,
ranetoj vete plonĝis en brilan marĉon — plaŭ plaŭ,
eleganta kolubro zigzage ĉasis frenezetan muson — ŝŝ ŝŝ,
kaŝita kukolo spitis Aleksandron: serĉu min — kuku kuku.

La knabo paŝetis, paŝetis, paŝis plu, certa, ke li baldaŭ trovos la kukolon, sed la ludema birdo restis nevidebla. Estis ja tiom da arboj, tiom da branĉoj, tiom da folioj. Liaj kruroj iom doloris. Li sidiĝis apud kresejo, demetis siajn ŝuojn kaj trempis siajn piedojn en la malvarma akvo. Per ŝtonetoj li timigis bluan libelon. Ridante, li tiel baraktis en la fonto, ke brilaj gutoj ŝprucis ĝis super lia kapo. Poste la laca knabo sterniĝis sur musko kaj tuj ekdormis.

Li sonĝis, ke s-ro Rojelo invitis kukolon partopreni en la muzikinstruado. La kukolo sidis sur la supra rando de la nigra tabulo kaj kantis strangan melodion: hu-u-u, hu-u-u. S-ro Rojelo grimacis kaj kriis: "Ne, vi kantas malĝuste, Aleksandro. Ĉesu miskanti kaj skribu centfoje: 'Mi diligentu en la solfeĝa leciono'." La lernanto protestis: "Ne mi, sed la kukolo kantas malĝuste". La kukolo, sur la supra rando de la nigra tabulo, rikanis: "Mi? Malĝuste? Hu-u-u, hu-u-u".

Aleksandro tiel furiozis kontraŭ la maljusta punskribo, ke li vekiĝis. Komence li ne konsciis, kie li kuŝas. La musko estis malvarma sub lia dorso. Palpe serĉante siajn litotukojn, li rimarkis, ke li ne dormas en sia hejma ĉambro. Noktis. La hu-u-u de lia sonĝo estis ululo de strigo. La tagaj bestoj malaperis. Nun la arbaro bruis maltrankvilige: bufoj kvakis, vaganta apro gruntis, kojoto bojis. Karaj infanoj, vi scias, ke en nia arbaro ne vivas kojotoj, sed la nokto dekobligis la timon de Aleksandro kaj igis lin fantazii mil teruraĵojn. Haste li serĉis siajn ŝuojn en la mallumo,

murmurante: "Mi tuj rekuru hejmen". Nu, estas facile diri: "Mi tuj rekuru hejmen", sed pli malfacile trovi la ĝustan direkton. Bona lernanto grimpus sur arbon, por observi, kie brilas la norda stelo. Ve, Aleksandro neniam atentis la klarigojn de s-ro Rojelo pri la orientiĝaj signoj en la naturo. Li kuris, stumblis, ploris. Vergoj vipis liajn vangojn. Subite, vidante du okulojn flagri malantaŭ dika trunko, la knabo falis genue kaj kriegis: "La lupo! La lupo!"

Izenverdo (ĉar fakte estis Izenverdo) milde diris:

— Infano, kial vi timas?

Aleĉjo ĝemis:

— Sinjoro lupo, ne manĝu mi.

Izenverdo ridis:

— Ho ho! Mi ne manĝos vin. Sed kial vi mem manĝas la akuzativon?

La malbona lernanto demandis:

— Kio mi manĝas?

— Vi manĝas la akuzativon. Eble mi povos helpi vin. Grimpu sur mian dorson kaj venu kun mi al mia ripozejo.

Vole nevole Aleksandro kroĉiĝis al la kolhararo de la lupo kaj rajdis al fora kaŝejo, kie li profunde endormiĝis sur seka foliaro. Li sonĝis, ke lupo formanĝis la perfidan kukolon kaj devigis s-ron Rojelo skribi centfoje: "Aleksandro estas bona lernanto".

Matene sunstrio enŝoviĝis en la lupejon kaj lekis la vizaĝon de la knabo. Palpebrumante, li vekiĝis kaj miris pri sia nekutima kuŝejo. Vidante la maljunan lupon sidi apud li, Aleksandro reekploris. Izenverdo trankviligis lin:

— Infano, kial vi timas min?

La knabo balbutis:

— Tial ke vi manĝis Ruĝkufulineto.

La ermito skuis la kapon:

— Unue oni diras Ruĝkufulineton. Ĉu vi aŭdas? lineton, ton, ton! Kaj due mi kompatas la stultajn homojn, kiuj provas eduki siajn idojn, rakontante al ili plej terurajn sensencaĵojn: ogroj buĉas infanojn; patrinoj senigas je siaj gefiloj, intence vojerarigante ilin en profundajn arbarojn; sorĉistinoj aliigas homojn en

porkojn; lupoj manĝas avinojn, ha ha!, ostajn, sensukajn avinojn. Ha, belegaj estas viaj fabeloj, kiuj temas nur pri sango, trompo, monavido, ruzo, milito, murdo. Brave, brave!

Aleksandro opiniis, ke la lupo pravas. Kial liaj libroj estas plenaj de tiaj fiaĵoj?

Izenverdo kvietiĝis kaj demandis la infanon pri lia nomo, lia familio, lia lernejo.

— Mi konstatis, ke via kono de la Lingvo Internacia iom lamas, ĉu ne? Do mi tuj klarigu al vi la gravecon de la akuzativo. Vi diras erare: "Lupo manĝas infano". Ni supozu, ke vi iam renkontos lupon, kiu tiel malbone parolas Esperanton, kiel vi. Nesciante, kiu manĝu kiun, eble tiu lupo manĝos vin. Tiel ekestas legendoj, fabeloj, fabloj. Nun ni ekzamenu viajn pliajn lernejajn konojn. Ĉu vi neglektis la geografion? Vi ja erarvagis en la arbaro. Tio neniam okazas al normala besto. Ni ne havas kompasojn nek mapojn, kiel vi, sed tamen ni ĉiam trovas nian vojon per simplaj rimedoj.

Dum du tagoj Aleksandro lernis de la klera lupo pli ol de s-ro Rojelo dum du jaroj. Ha, kiel bela klasĉambro estas la naturo!

Tiuj helpaj lecionoj tamen ne konsolis la gepatrojn, kiuj angoris pro lia malapero. La instruisto konfirmis, ke ilia filo forestis de la lernejo. La patrino ploris. La patro petis najbarojn esplori putojn kaj garbejojn. Kiam kamarado de Aleksandro menciis ties intencon promeni apud la arbaro, la viroj de la vilaĝo organizis amasan serĉadon en la distrikto. Oni baldaŭ trovis la tornistron en fosaĵo kaj tuj konjektis, ke la infano perdiĝis en la densejoj.

Aŭdinte malproksime bojadon de hundoj, Izenverdo malgaje diris al sia lernanto:

— Grimpu sur mian dorson. Venis por vi la tempo reiri al la tiel nomata civilizacio. Mi rekondukos vin al la loko, kie mi trovis vin, kaj mi adiaŭos vin, sed neniam forgesu ke lupoj estas iafoje pli humanaj ol multaj homoj.

Aleksandro sentis varman lekadon sur la nazo kaj la vangoj. Malfermante la okulojn, li vidis la muzelon de Nigrulo, la bona hundo de la gepatra domo, kiu ĝemblekis super lia vizaĝo. Baldaŭ multaj viroj alkuris al la kresejo, kriante: "Jen li kuŝas, jen li kuŝ-

as''. Lia patro lin levis, kisis kaj forportis, dirante: ''Mi kredas, ke li febras''.

Dum la preĝeja sonorilo anoncis la ĝojan novaĵon al la vilaĝanaro, la patrino senvestigis la retrovitan filon, ŝovis lin en lian liton kaj petis la avinon prepari infuzaĵon el tiliaj floroj. La maljunulino kapjesis, lamentante:

— Nia kompatinda Aleĉjo vere bezonas trankviligaĵon. Ĉu vi aŭdas lin delire ripeti: ''Mia bona lupo, mia bona lupo''? Tio certe devenas de la strangaj aferoj, kiujn oni nun instruas en la lernejoj.

MALAPERIS LA FACILA VENTO

FOJE 4247 (kvar mil ducent kvardek sep) esperantistoj kunvenis en la aŭlo de la universitato, por soleni la finon de sia Universala Kongreso. Sur podio ornamita per verdaj flagoj, malantaŭ longa tablo sidis eminentuloj: la prezidanto, kiu metis sian cilindran ĉapelon sur la verdan tablotapiŝon; la vicprezidanto, kiu deziris fariĝi prezidanto, por havi tiel belan ĉapelon; la ĝenerala sekretario, kiu ĉagrene mienis pro dentodoloroj; la kasisto, kiu ridetis pro la ĵus enspezitaj 4247 kongresaj kotizoj; la Akademiestro, kiu dormetis pro troa cerbumado; la delegitino de la junularo, kiu ĝuis eternan junecon.

Kantistoj ariĝis antaŭ la podio, por kanti la Himnon. Kiam la ĥorestro levis sian taktobastonon, la eminentaj kaj la simplaj ĉeestantoj ekstaris kaj silentis. Tiu momento ĉiam profunde impresas ĉiujn, eĉ la veteranojn, kiuj partoprenas en multaj kongresoj ekde la unua en Bulonjo.

La melodiaj voĉoj plenigis la salonon:

"En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko.
Per flugiloj de..."

Krak! Nenio plu! La kantistoj rigardis sin konsternite. Murmuro trairis la ĉeestantaron. La prezidanto ĵetis demandan rigardon sur la ĥorestron. Kion signifas tiu bedaŭrinda interrompo? La ĥorestro senhelpe levis la ŝultrojn kaj frapis la pupitron per sia bastono. Tak tak tak. Ni rekomencu. Per hezitaj voĉoj la ĥoro ekkantis duafoje la Himnon:

"En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko.
Per flugiloj de..."

Krak! Silento! La kongresanaro laŭte protestis: Hu! Fi! Tian fuŝaĵon oni ĝis nun neniam spertis. La prezidanto surmetis sian

cilindran ĉapelon kaj malsuprenkuris de sur la podio al la ĥorestro. La kompatinda muzikisto sidis sur la planko kaj ploris. Li nur geste montris la partituron, en kiu faŭkis blanka loko: evidente mankas duonverso de la Himno.

Tuj diversaj fantaziaĵoj dissaltis de buŝo al orelo. Temas pri ŝtelo aŭ sabotado aŭ puĉo. La ĉeestantoj tumultis al la elirejoj de la salono, kaj ekstere oni plu diskutis kaj disputis. Sur la trotuaro du samideanoj eĉ provis solvi la problemon, reciprokante pugnajn argumentojn. Fluis sango, nur nazosango, sed ja sango.

La kongresanoj revojaĝis hejmen kun ĉagreno en la koro.

Dum la sekvantaj tagoj la naciaj gazetoj, sub grandaj titoloj, raportis kaj komentariis la strangan fenomenon: ONI ŜTELIS LA FACILAN VENTON DE LA ESPERANTISTOJ. La prezidanto kunvenigis komisionon, kiu kreis subkomisionon, kiu elektis fakdelegiton pri ventaj aferoj. La delegito vizitis la ventmuelejojn de la kongresa regiono. La ventmuelejoj levis la ŝultrojn kaj diris:

— Ne ĝenu nin. Ni kunlaboras nur kun seriozaj, fortaj ventoj.

La delegito demandis la direktoron de la operejo, ĉu hazarde facila vento sin kaŝas en fagoto, hobojo aŭ alia blovinstrumento de lia orkestro. La operejestro telefonis al la direktanto de la orkestro:

— Oni eble perdis ion en nia operejo.

— Kion vi serĉas?

— La facilan venton de la esperantistoj.

— Kio estas tio?

— Ĉu vi ne konas la muzikon de s-ro Menu de Ménil?

La orkestrestro rikanis:

— Ĉu vi kuraĝas nomi tion muziko? Taratata, taratata! Eĉ en kazernoj oni ne aŭdas tiajn kakofoniojn.

Li abrupte rekroĉis la telefonon kaj levis la okulojn al la ĉielo, ĝemante kun naŭzita mieno:

— Ha, pardonu Mozarto, pardonu Vagnero!

La fakdelegito foriris kaj informiĝis ĉe koketulinoj, ĉu iu, svingante sian ventumilon, rimarkis nekonatan facilan venton. Ili respondis, ke temas pri miskompreno: malgraŭ sia nomo ventum-

ilo estas nur delikata ludilo, movebla masko ebliganta al elegantulino kaŝe-malkaŝe nuanci la efektojn de sia rigardo.

La delegito iradis plu de loko al loko, demandante ĉiujn pasantojn, ĉu iu vidis la malaperintan facilan venton. Iam li renkontis bubaĉon, kiu diris al li:

— Mi povas mallevi mian pantalonon kaj facile aŭdigi al vi belan venton el mia postaĵo.

Ŝokite, la delegito volis piedbati la proponitan postaĵon, sed liaj lacaj maljunaj kruroj ne ebligis al li persekuti la senhontan krudulon, kiu, ridaĉante, forkuris kaj malaperis ĉe la plej proksima stratangulo. Senkuraĝiĝinte, la delegito reiris al la prezidanto kaj demisiis. Sekve la esperantistoj havis nek facilan venton nek fakdelegiton pri ventaj aferoj.

La poetoj diligentis, por provi anstataŭigi la facilan venton per konvena, harmonia, belrima hemistiko, sed la popolo rifuzis la versajn flikaĵojn. Ĉu oni povus dece kanti:

"per flugiloj de vigla talento
aŭ de bona patento
aŭ de malmola dento"?

La poresperanta propagando stagnis. Kiel varbi homojn al senhimna Movado! Movado sen himno estas supo sen salo, fromaĝo sen odoro, fluto sen truoj, kombilo sen haroj, militisto sen uniformo, akademio sen vortaro.

Kvar semajnojn post tiu fatala Universala Kongreso sekretariino de la Centra Oficejo preskaŭ svenis, trovante meze de la korespondaĵoj filatele afrankitan poŝtkarton el Marsejlo:

"Korajn salutojn el la Unua Monda Kunblovo de Ventoj. Ĝis baldaŭ.

Sincere via

Facila Vento".

Svingante la poŝtkarton, la sekretariino galopis tra la koridoroj de la Centra Oficejo, blekante: "Retrovita! Retrovita!". La ĝenerala sekretario, abrupte vekite el sia siesto, grumble demandis, kion signifas tiu bruaĉo. Kiam ŝi tenis la vidaĵon el Marsejlo antaŭ lia nazo, li sakris, reenŝuigis siajn piedojn kaj kuris al la telefono, por informi la prezidanton. Dank' al speciala numero de

HEROLDO la novaĵo fulme ĉirkaŭiris la mondon, kaj ĝojo renaskiĝis en la esperantistaj hejmoj. Ses riĉaj samideanoj eĉ trinkis ĉampanon.

La prezidanto decidis esprimi al la vaganto severan riproĉon pro tia senpripensa konduto, endanĝeriginta la ekziston de la Movado kaj la Internacian Lingvon entute. Sed lia koro ekfandiĝis, kiam la facila vento, sunbruniĝinta pro la restado en suda regiono, metis sian eteran postaĵon en fotelon antaŭ lia skribtablo kaj rakontis:

— Sinjoro prezidanto, bonvolu pardoni mian malaperon. Mia amiko Zefiro invitis min al la Unua Monda Kunblovo de Ventoj.

— Kial vi foriris tiel subite?

— Tial ke la Kunblovo estis komenciĝonta la postan tagon. Ne restis sufiĉe da tempo, por sciigi mian forvojaĝon al miaj himnaj najbaroj. Nova Sento kaj Forta Voko mem ekskursis, kaj Glavo Soifanta estis ebria.

— Mi scias, ke nuntempe mankas disciplino en la Movado. Sed viaj najbaroj almenaŭ ĉeestis akurate en la solena fermo de la Universala Kongreso, dum vi promenis.

— Sinjoro prezidanto, mi ne perdis mian tempon: mi propagandis Esperanton.

— Ĉu?

— Jes, per miaj flugiloj mi flugis de loko al loko kun Zefiro laŭ la bela rodana valo. Survoje Mistralo, forta knabego, aliĝis al ni kaj ŝerce kurigis nin pli rapide ol ni povis. Senspire ni alvenis en Marsejlo, kie jam ariĝis diversaj kolegoj el la tuta mondo. Ha, vere brila estis la interkona vespero. Mi memoras pri

Brizo kun rozaj vangoj,
Alizeo iom febra,
Samumo kaj Ĥamsino en arabaj vestoj,
Tajfuno el Ekstrema Oriento,
Musono senĉese viŝanta sian ŝvitan frunton,
Uragano kaj Ciklono, kies voĉoj superbruis la konversaciojn...

— Bone, bone. Kaj poste?

— Prezidanto Eolo petis min fari paroladon pri Esperanto. Mi

sukcesis varbi multajn kunulojn, kiuj promesis de nun blovi nur en la Lingvo Internacia.

— Kara Facila Vento, mi gratulas kaj pardonas vin, ĉar vi pruvis, ke ventaĵoj ja ne ĉiam estas vantaĵoj. Sed, mi petas vin, ne forlasu nin sen permeso de la Centra Oficejo. Via loko estas tro grava en la Movado.

Post kiam la facila vento elŝvebis tra la fenestro kaj reiris al la dudekunua etaĝo de la Himno, la prezidanto longe meditis. Li revis pri ĉiuj folioj kaj herberoj en la mondo, kiuj, post la karesa mesaĝo de la esperantistaj ventoj, prave fieros pri sia verda koloro.

LA BONA FEINO AMENTA KAJ SINJORO AKUKU

FOJE, en la jaro 1894, pola feino aŭdis, ke ĵus aperis en Varsovio "Ekzercaro" de iu D-ro Zamenhof. La ekzercaro kompletigis gramatikon de lingvo internacia eldonitan sep jarojn antaŭe sub la pseŭdonimo D-ro Esperanto. Oni raportis al ŝi, ke en tiu ekzercaro troviĝas teksto titolita "La feino". Ĉar ŝi kolektis ĉiujn verkojn pri sia supernatura mondo, la pola feino lernis la lingvon internacian, same kiel ŝi pli frue dediĉis iom da tempo al la franca, germana kaj dana lingvoj, por legi fabelojn de Perrault, Grimm kaj Andersen.

Karaj infanoj, vi eble miras, ke feino povas lerni tiom da fremdaj lingvoj. Ne forgesu, ke feino estas feino. Ŝi bezonas nur sidi tri minutojn sur lernolibro de la koncerna lingvo, tuŝi sian frunton per sia sorĉovergo kaj trifoje ripeti: "abrakadabra-simsalabim-pumpumtralala". Ne kredu, ke tiu metodo estas facila. Jam okazis, ke malatenta feino, post triminuta varmigo de lernolibro sub la postaĵo, fuŝdiris ekzemple: "abrasalabim-tralalapumpum". Sekve la tuta afero fiaskis, kaj la kompatindulino neniam parolis la fremdan lingvon.

La pola feino havis lertan langon, kaj, post senerara trifoja ripetado de "abrakadabra-simsalabim-pumpumtralala", ŝi perfekte ekparolis Esperanton. Ŝi atente legis la rakonton de D-ro Zamenhof pri "La feino". Vi certe konas la tekston, eble parkerigis ĝin: "Unu vidvino havis du filinojn, ktp". Ŝi tuj rimarkis, ke ĝi estas nur traduko el la franca Fabelaro de Perrault. Tamen Esperanto mem ŝajnis al ŝi tiel belsona interkomprenilo, ke ŝi poste preferis ĝin al la ceteraj lingvoj.

Jam ĉe la legado de la franca originalo ŝi ĉagreniĝis, ke oni malprave atribuas malicon al ŝiaj samulinoj. Dum pluraj jaroj ŝi ne



reagis al tiu maljustaĵo, sed, kiam ŝi rimarkis, ke la lingvo internacia rapide disvastiĝas en la mondo, ŝi decidis skribi al D-ro Zamenhof:

"Kara Majstro,

vi menciis en via Ekzercaro koleginon de mi, kiu igis malamindan knabinon kraĉi serpentojn kaj ranojn. Tiu malfeliĉulino tiel suferis de la severa puno, ke ŝi mortis en angulo de arbaro. Kara Majstro mi bedaŭras, ke vi senkritike alprenis kalumniojn de la franco Perrault. Mi asertas, ke mi neniam aŭdis pri tiaj teruraj okazaĵoj en nia medio kaj sekve mi petas vin ŝanĝi la tekston en la eldonotaj ekzercaroj de via mirinda lingvo internacia.

Pola Feino
Poŝtrestante
Varsovio"

D-ro Zamenhof respondis (ha, mi ne forgesu diri al vi, ke tio okazis en la jaro 1905), do D-ro Zamenhof respondis:

"Estimata sinjorino feino,

skribante mian Ekzercaron, mi tute ne intencis ĉagreni vin. Antaŭ kelkaj jaroj mi estus volonte ŝanĝinta la tekston, por plaĉi al vi. Sed nun la Ekzercaro apartenas al la Fundamento. Kiel vi scias, ekde la Bulonja Kongreso la Fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj. Espereble vi komprenos tiun gravan decidon kaj eĉ klarigos ĝin al viaj koleginoj.

Mi dankas vin pro via helpo kaj restas

samideane via
L. L.
Zamenhof"

La feinon, kiu estis inteligenta feino, tiel konvinkis la rezonado de D-ro Zamenhof, ke ŝi fariĝis unu el la plej energiaj defendantoj de la Fundamento. Oni eĉ nomis ŝin feino Fundamenta kaj poste simple feino Amenta. Vi homoj, kiuj rampas sur la tero,

malofte renkontas feinojn. Male ni birdoj ŝvebas en la aero, kiel ili. Mi povas do fidele raporti pri kelkaj agoj de la bona feino Amenta. Ŝi estas cetere facile rekonebla inter siaj kunulinoj per brila verda stelo ornamanta ŝian sorĉovergon (Tiun detalon mi indikas ĉefe por la poetoj, kiuj ankaŭ ofte ŝvebas en la aero).

Mi ne rakontos al vi la tutan historion de la lingvo internacia. Famaj fakuloj faris tion pli bone, ol mi, simpla pigo, povus fari. Mi mencios nur kelkajn epizodojn, en kiuj oni ĝis nun bedaŭrinde prisilentis la efikon de nia feino.

En la jaro 1907 iuj esperantistoj provis per malhonestaj rimedoj anstataŭigi la Zamenhofan infanon per bastardo, kiun ili aŭdacis nomi Ido. Ili preskaŭ sukcesis. Feliĉe iun nokton Amenta vizitis la oficejon de la perfiduloj kaj, tuŝante per sia sorĉovergo iliajn gramatikojn kaj vortarojn, plenigis la kontraŭfundamentan lingvon per multaj strangaj formoj. La morgaŭan tagon adeptoj de tiu transsorĉita Ido subite uzis vortojn, kiujn la aliaj ne komprenis. Ekzemple, anstataŭ uzi la pronomon "ĝi", kiel ni esperantistoj, ili diris jen "olu", jen "ol", jen "lu". Sekve ilia kripla projekto baldaŭ dissplitiĝis kaj malaperis en la rubejon de la Historio (Tiun trafan formulon mi iam aŭdis de mia kuzo Lanio, kiu studis la oratoran arton en Ateno).

La bona feino Amenta oportune intervenis plu en la postaj jaroj, por ke ne pereu nia belega lingvo internacia sub la batoj de la sorto aŭ de la homoj.

Dum la unua mondmilito ŝi savis la internan ideon de Esperanto, sugestante al samideanoj loĝantaj en neŭtralaj landoj, ke ili helpu la viktimojn de la teruraj, sensencaj bataloj. Ankaŭ memoru, ke poste, kiam diktatoroj provis sufoki Esperanton en siaj landoj, frapo de ŝia sorĉovergo tuj naskis novan flamon en aliaj mondopartoj. Iafoje eĉ esperantistoj, ho honto, kondutas malamike kontraŭ esperantistoj, ofte pro nuraj bagateloj. La feino devas flugadi de akademio al redakcio kaj de redakcio al akademio, por konvinki la partiojn, ke vere ne gravas la uzo de tiu ĉi aŭ de tiu sufikso, de tiu ĉi aŭ de tiu participo. Mi, simpla pigo, opinias, ke tiel longe, dum esperantistaj moŝtoj komprenas la insultojn de aliaj esperantistaj moŝtoj, tio sufiĉas por pruvi la klarecon de nia lingvo internacia.

Tiuteme mi rakontu al vi lastan faron de la feino Amenta. En la urbo vivis notario, s-ro Bilbok, kiu senĉese proponis ŝanĝojn en la gramatiko kaj la vortaro de Esperanto: oni forigu la artikolon, kiu ne ekzistas en la latina kaj la rusa lingvoj; oni diru: "Espelanto" pro la ĉinoj, kiuj ne konas la sonon "r"; oni ne akcentu la antaŭlastan silabon de la vortoj, por ne ĝeni la francojn; oni uzu "e" anstataŭ "kaj", ktp ktp. Kiam s-ro Bilbok aperis en kunveno, ĉiuj esperantistoj forkuris antaŭ liaj stultaĵoj. Oni plurfoje konsilis al li paroli sian ĵargonon sola en sia loĝejo. Vane. Lia lasta eltrovo estis la senutileco de la akuzativo. Tiu kreteno kompreneble ege ĝenis la propagandon de Esperanto.

La distrikta delegito iam promenis en la kamparo, apud nia vilaĝo, meditante pri la pereiga influo de s-ro Bilbok, kiam li hazarde renkontis la feinon Amenta. Ŝi atente aŭskultis liajn plendojn, ridetis kaj promesis kontraŭi al la malakuzativemulo.

— Ne timu, sinjoro delegito, mi ne igos lin kraĉi serpentojn kaj ranojn, sed baldaŭ li jam ne endanĝerigos la Fundamenton.

Fakte ŝi flugis al la urbo kaj nokte, dum lia dormo, tuŝis per sia sorĉovergo la buŝon de s-ro Bilbok. Ekde tiu momento la notario ne kapablis ĝuste prononci la vorton "akuzativo". Li nur balbutis "akaka-akuku-akakakuku".

Kiam li volis denove prediki en kunveno kontraŭ la Esperanta akuzativo, ĉiuj ĉeestantoj ridegis kaj kriis, imitante lin, "akaka-akuku". Li provis rekomenci sian argumentadon: "Gesinjoroj, mi opinias, ke la akaka-akuku-akakakuku..." Poste li silentis, ne komprenante, kial lia lango subite kroĉiĝis inter liaj dentoj, kaj li fuĝis sub la mokoj de la esperantista publiko.

De tiam oni nomis s-ron Bilbok Akuku, poste oni forgesis lin. Mi scias, ke nun Akuku restas hejme kaj dediĉas sian tempon al pedanta reordigo de juraj paragrafoj, unuvorte al nenio.

Jes, karaj infanoj, al nenio.

LA VERDA PUNO

FOJE en la vilaĝa lernejo oficis terura instruisto. Tiutempe instruistoj kutime severe traktis la lernantojn, kaj viaj gepatroj povus konfirmi la apartan malmildecon de sia tiama instruisto, s-ro Goralo. Ili certe memoras la survangojn, piedbatojn kaj pugvergadojn, kiuj pluvis ĉe ĉiu malfruiĝo, nelernita leciono aŭ malpermesita petolaĵo. Konfesu, karaj infanoj, ke via nuna instruisto, s-ro Rojelo, estas vere indulga, kiam li ekzemple igas vin skribi dudekfoje: "Mi ne metu prempinglon sur la seĝon de mia najbaro".

La lernantoj de s-ro Goralo provis venĝi sin, nomante lin la Gorilo, sed ve!, se li aŭdis tion: puno tuj falis. Kaj koncerne punojn la Gorilo estis inventema. Ĉu vi scias, kiel li gvidis la Esperanto-kurson? Apud sia katedro li havis poton da verda farbo, en kiu trempiĝis peniko. Kiam knabo balbutis en la recitado de poemo aŭ malĝuste respondis gramatikan demandon, s-ro Goralo kriis:

— Alproksimiĝu!

La kompatinda lernanto devis stari apud la katedro kaj ricevis sur la nazon tuŝon da verda farbo. La instruisto rikanis:

— Tio helpos Esperanton eniri en vian cerbon.

Kaj tio daŭris dum la tuta kurso.

— Alberta, kial vi ne konas la diferencon inter "sonĝo" kaj "revo"? Alproksimiĝu!

Malgraŭ ŝiaj larmoj baldaŭ verdiĝis la ĉarma roza nazo de Alberta. Se ŝi ankaŭ pekis kontraŭ la akuzativo, ŝi ricevis plu verdan koloron sur la dekstran vangon. Se Alberta krome ne sciis, kio estas la refleksivo, la peniko de s-ro Goralo ŝmiris ŝian maldekstran vangon.

Vespere, kiam la infanoj revenis hejmen, ili ofte aspektis kiel karnavala irantaro. Por ke la gepatroj ne rimarku la verdan punadon, la lernantoj haltis apud la placa fonto kaj lavis siajn vizaĝojn. Poste ili dancis en rondoj, kantante:

— Malamu, malamu la despoton.
La Gorilo falu en sian poton.

Iuj pasantoj demandis, kion signifas tiu stulta ludo. Kiam la infanoj respondis, ke tiel oni lernas Esperanton, la scivoluloj skuis la kapon, murmurante:

— Vere stranga lingvo.

S-ro Rubeno, la distrikta delegito de la Esperanto-movado, aŭdis pri tiu skandala pedagogio. Li decidis interveni:

— Sinjoro instruisto, oni raportis al mi, ke vi verdigas la nazojn de viaj lernantoj, kiam ili ne bone scias sian lecionon de Esperanto.

S-ro Goralo agreseme bojis:

— Nu, kial ne?

S-ro Rubeno provis milde konsciigi al li la pereigan efikon de tia instrumetodo:

— Se ni tiel agus en nia urbo, neniu lernus la Lingvon Internacian.

— Mi ne scias, kiel vi agas en via urbo (S-ro Goralo prononcis "en via urbo" kun naŭzita mieno), sed mi garantias al miaj junaj vilaĝanoj perfektan esperantistiĝon. Male vi...

— Male mi...?

— Male vi mem eĉ ne povus parkere reciti la dek ses regulojn de la Fundamento.

— Mi konfesas, ke...

— He, vi konfesas. Do, sinjoro, bonvolu lasi min labori laŭ mia propra sistemo kaj ne igu min perdi mian tempon. Mi devas nun replenigi mian poton per freŝa verda farbo por nia morgaŭa leciono. Adiaŭ!

S-ro Goralo abrupte turnis la dorson al la delegito kun moka ridaĉo.

Survoje s-ro Rubeno biciklis ĝis mia poplo kaj elverŝis sian koron:

— Ho, verda pigo, kion vi opinias pri tiu terura instruisto?

Tiam mi ne kapablis kompari la diversajn instrumetodojn. Por mi, juna denaska esperantista pigo, la Lingvo Internacia estis nur natura heredaĵo de miaj bonaj gepatroj. Mi provis forskui la ĉagrenon de s-ro Rubeno:

— Sinjoro delegito, mi ja ofte vidis la verdigitajn vizaĝojn de la vilaĝaj infanoj. Ili malbenas sian instruiston, kiun ili nomas la Gorilo. Sed ĉu ne ĉefas, ke Esperanto disvastiĝas tiel ĉi aŭ tiel?

— Ne, certe ne. La interna ideo ne toleras diktatorajn metodojn en la instruado aŭ la propagando de Esperanto.

— Jes, vi pravas, sinjoro Rubeno. Kion ni faru kontraŭ tio?

— Mi mem ne havas rimedon por proponi, sed mi cerbumos pri tio. Eble vi dume trovos solvon.

La delegito reprenis sian biciklon kaj malgaje pedalis al la urbo.

Mi pensis: "Brave! Li cerbumos, kaj mi trovos solvon. Ha, oportuna agmaniero! Homoj misas, kaj ni, inteligentaj birdoj, riparu iliajn misaĵojn".

La infanoj, kiel vi nun faras, vizitis miajn poplajn kunvenojn, kaj, ĉiufoje kiam mi vidis verdajn spurojn sur nazo aŭ vango, mi demandis:

— Ĉu vi ne diligente lernis vian lecionon de Esperanto?

Ĉiuj kune ekkriis protestojn, el kiuj mi kaptis nur frazpecojn: "fiulo, sadisto, gorilo", kaj aliajn insultojn, kiujn mi ne kuraĝas ripeti.

Iam oni anoncis al la infanoj, ke post kelkaj tagoj inspektisto vizitos la lernejon. S-ro Goralo donis cent rekomendojn kaj avertojn:

— Venontan merkredon ĉiuj aperu kun puraj vestoj, manoj, vizaĝoj, kajeroj. Escepte ne estos punoj antaŭ la inspektista moŝto. Sed eventualajn mankojn, erarojn, malkorektaĵojn merkrede kompensos duobla puno ĵaŭde.

Tiu vizito de la inspektisto tremigis ĉiujn lernantojn. Mi trankviligis ilin:

— Karaj infanoj, ne timu. Bone aŭskultu miajn konsilojn. Jen tio, kion vi faru. Sed, ŝŝ! tio restu sekreta ĝis merkredo.

Kiam la malnova aŭto de la inspektisto, s-ro Akrokul, haltis en la korto, s-ro Goralo demetis sian ĉapelon kaj blovis en sian trilfajfilon. Tiam la lernantoj, starantaj duvice, ĥore kriis: "Bonan tagon, sinjoro inspektisto". Ĉe dua fajfo la piedoj militiste ekmoviĝis (tri-kvar, tri-kvar!) kaj komencis eniri en la klasĉambron. Unuavide tia disciplino favore impresis s-ron Akrokul.

En tiu momento aŭdiĝis terura eksplodo antaŭ la lernejo. Kio okazis? Sidante en la platano, meze de la korto, mi estis tute simple faliginta skatolon da verda farbo, kiun mi tenis en mia beko. La verda ŝmiraĵo trafis la karoserion de la malnova aŭto kaj ekfluis malsupren laŭ la antaŭa glaco ĝis sur la kapoto.

S-ro Akrokul lamentis:

— Ho, mia bela aŭto! Kion signifas tio?

La infanoj kriis ĥore:

— Tio estas la verda puno, sinjoro inspektisto.

S-ro Goralo rigardis supren sed ne povis vidi min malantaŭ la folioj. Li vane provis forfroti per sia naztuko kaj siaj manikoj la verdan farbon,kiu miksiĝis kun la polvo de la karoserio. S-ro Akrokul demandis kolere:

— Kion signifas "la verda puno"?

— Ba, sinjoro inspektisto, tio signifas nenion.

Aŭdante la lernantojn mallaŭte rikani, la Gorilo blekis:

— Tri-kvar, tri-kvar! En la klasĉambron!

Kaj li sekvis sian grumblantan superulon en la lernejon. Aj! sur la sojlo hazarde embuskis la poto de la Gorilo, verdire ne hazarde, sed laŭplane. Kompreneble la inspektisto stumblis, kaj la farbo ŝprucis sur liajn ŝuojn kaj lian pantalonon. Mi kredas, ke dekduo da akcipitroj ne povus kune kriĉi tiel laŭte kiel s-ro Akrokul post tiu katastrofo. Li kriis plengorĝe:

— Kion signifas tio?

La klaso respondis ĥore:

— Tio estas la verda puno, sinjoro inspektisto.

La akraj okuloj de s-ro Akrokul fiksis sin sur s-ro Goralo, kiu, viŝante sian ŝviton per sia naztuko, verdigis sian tutan vizaĝon.

— Ĉu vi fine klarigos al mi tiun verdan punon, sinjoro instruisto?

La Gorilo balbutis:

— Sinjoro inspektisto, kiam klasano ne diligente lernas Esperanton, mi delikate tuŝas lian nazon per verda farbo. Vi scias, sinjoro inspektisto, ke la verda koloro estas parto de la Esperanta kulturo kaj...

— Bonvolu silenti.

Oni ne sciis, ĉu la ordono direktiĝas al la instruisto aŭ al la laŭte ridantaj lernantoj. Kun dubema mieno la inspektisto iris al la katedro, murmurante:

— En mia tuta kariero mi neniam spertis tian hontindaĵon.

Sidiĝante, por iom cerbumi pri tiu nekredeblaĵo, li sentis sub la postaĵo ĝenan objekton. Li tuj ekstaris, tenante penikon plenan de verda farbo. Li preskaŭ ploris:

— Kion signifas tio?

La klaso refrenis:

— Tio estas la verda puno, sinjoro inspektisto.

De sur la platano mi subite vidis s-ron Akrokul elkuri el la lernejo, svingante penikon kaj ridaĉante kiel frenezulo:

— Ha ha! la verda puno! Ha ha! la verda puno!

Li saltis en sian verdigitan aŭton, bojigis la motoron, perdis kotŝirmilon kontraŭ la trunko de la platano kaj malaperis en nubo da benzinfetora polvo. S-ro Goralo vane postkuris lin vokante:

— Sinjoro inspektisto! Sinjoro inspektisto!

Malgaje la instruisto revenis en la klasĉambron, sidiĝis sur sia verda seĝo, iom pli verdigis sian vizaĝon per la malpura naztuko kaj murmuris:

— Reiru hejmen kaj diru al viaj gepatroj, ke morgaŭ la lernejo estos fermita. Mi estas malsana.

La lernejo restis fermita unu semajnon. Poste alvenis nova, juna instruisto, via nuna instruisto, s-ro Rojelo, kiu bezonas nek penikon nek poton da verda farbo, por ilustri siajn lecionojn de Esperanto.

Ĉar la ŝtato ĉiam trovas taŭgan lokon por siaj oficistoj, s-ro Goralo fariĝis subdirektoro de la urba arestejo, kaj, kredu min aŭ ne, ankaŭ la nevolontaj gastoj de tiu malliberejo nomas lin la Gorilo.

LA ETA POETO KAJ LA LOKOMOTIVO

FOJE vivis en nia vilaĝo junulo, kiu estis tiel poeziema, ke li kutime parolis verse. Kiel ĉiuj veraj poetoj, li havis palan vizaĝon kaj hirtajn harojn. Lia pantalono estis tro mallonga, lia jako pendis ĝis sur lia osta postaĵo, kaj lian ĉapelon ornamis lekanto. Lia rigardo restis fiksita sur fora fantazia mondo, kaŝita al la okuloj de ordinaraj homoj. Kiam oni vidis lin, oni simple diris: "Jen la eta poeto".

Ĉar li amegis la naturon, li ofte paŝis preter mia poplo, deklamante belajn poemojn, kiujn aŭskultis nur ni birdoj.

Liajn gepatrojn afliktis tiu difekto, kiu ĝis tiam trafis neniun alian membron de la familio. Ili provis lernigi al li metion:

— Filo, kiu kuiros vian ĉiutagan supon post nia morto?

Li milde respondis:

— Ne kredu, karaj miaj, ke ofte manĝi supon
Sufiĉas por atingi de l' gloro supran ŝtupon.

Lia patro prezentis lin al forĝisto. La forĝisto, palpinte la brakajn muskolojn de la junulo, grimacis kaj diris:

— Alportu al mi la martelon, la dikan, tie en la angulo.

La eta poeto iris al la angulo de la forĝejo, kaptis la tenilon de la martelo sed eĉ ne provis levi ĝin, ĉar lin subite fascinis la ruĝa braĝo brilanta en la forno, sub la granda balgoblovilo. Li murmuris:

— Rigardu, kiel lerte sin kaŝas arda flamo.
Ho, kial ne ekzistas kaŝejo por la amo?

La forĝisto skuis la kapon kaj diris al la patro:

— Reprenu vian filon. Li eĉ ne kapablas levi martelon. Krome li ĵargonas pri mia forno strangaĵojn, kiujn mi ne komprenas.

En la postaj monatoj la eta poeto proponis siajn servojn al kamparaj aŭ urbaj mastroj, sed li ne sukcesis resti en ĉiu loko pli ol du aŭ tri tagojn.

Li laboris kiel masonisto kaj komencis konstrui muron laŭ sia propra gusto. Prave opiniante, ke la nunaj domoj aspektas grize kaj malgaje, li elektis diversajn buntajn ŝtonojn. Sed la efekta rezulto tute ne impresis la arkitekton, kiu proze konstatis la nevertikalecon de la muro.

Post sia maldungiĝo la eta poeto fariĝis vendisto en librejo. Sed li vendis nenion. Sidante sur ŝtupareto, li lernis parkere poemojn de Kalocsay. La klientoj plendis al la estro de la librejo, ke neniu okupiĝas pri iliaj deziroj. Kelkaj legemuloj eĉ simple prenis librojn, tute ne pagante ilin. La librejestro, bona homo, kiel decas al anoj de tiu korporacio, donacis al la eta poeto la volumon de Kalocsay kaj deziris al li plenan sukceson en alia profesio.

Estas facile antaŭvidi, ke, se kuiristo intermiksas salon kaj lavpulvoron, la gastoj de restoracio protestas. Karaj infanoj, mi apenaŭ bezonas precizigi, kiu kulpis pri tiu bedaŭrinda misaĵo. Kiam la ĉefkelnero impetis en la kuirejon, li ekvidis la etan poeton, kiu trankvile turnis kuleregon en granda poto, legante libron tenatan en la maldekstra mano. Ĉar la libro ne estis receptaro, sed nur poemaro de iu William Auld, la eta poeto ricevis fortan piedbaton sur la postaĵon kaj devis iri al la direktoro. Informite, la direktoro, prudenta komercisto, enmanigis al la provizora kuiristo laŭdan ateston kaj rekomendis al li prezenti ĝin al apuda konkurenca restoracio.

Tamen, naŭzite de kuirejaj odoroj, la eta poeto prefere kuris al la stacidomo, por revojaĝi al nia vilaĝo. Sed li ne havis sufiĉe da mono por aĉeti fervojan bileton. Li sidiĝis sur benko kaj ĝemis:

— Nur du flugilojn havi kaj migri ĉirkaŭ l' mondo,
Jen vere bela revo por povra vagabondo.

En tiu momento li ekvidis, sur aparta trako, malgrandan lokomotivon. Ha, la bela lokomotiveto! Ne neŭtrala monstro, kiel la modernaj robotoj trenantaj longajn vagonojn, sed vivanta estaĵo. La eta poeto alproksimiĝis al la nigra-ruĝa lokomotivo, kiu ripozis sola en sia angulo. Iom da vaporo eliĝanta el la nazo montris la regulecon de la spiro kaj la profundecon de la dormo. Li admiris la sveltajn radojn, la rondan ventron, la brilajn dorsajn ornamaĵojn. Baldaŭ lia apuda paŝado vekis la lokomotiveton, kiu mal-

fermis unu okulon kaj suspiris: "Ŝŝŝ!". Li provis senkulpigi sin:

— Pardonu. Mi ne intencis ĝeni vian dormon. Mi estas nur poeto, kiu vagas tra tiu malgaja stacidomo.

Rigardante lin, la lokomotivo konstatis, ke li estas vera poeto pro la lekanto pikita sur lia stranga ĉapelo.

— Sinjoro poeto, vi tute ne ĝenas min. Male. Kutime neniu alparolas min, kaj ankaŭ mi enuas. Ŝŝŝ!

— Ĉu vi enuas, kursadante tra la mondo?

— Ho! ŝŝŝ, vi eraras. Mi ne rajtas forlasi la stacidomon. La tutan tagon mi tiras vagonojn de trako al alia. Ha! se almenaŭ ili rakontus al mi pri siaj foraj vojaĝoj, sed ili estas mutaj brutoj. Ŝŝŝ!

— Mi komprenas vian ĉagrenon, lokomotiveto.

— Ĉuĉu estas mia nomo.

— Ĉuĉu, kiel belsona nomo! Pri vi mi verkos odon, kiu famigos vin en la tuta mondo.

La malgranda lokomotivo ruĝiĝis, fermis la okulojn kaj flustris:

— Ŝŝŝ! Ĉu odo? Pri mi? Mi sentas min vere konfuzita.

La eta poeto ĵetis sian ĉapelon en la aeron, rekaptis ĝin kaj ekkriis:

— Ĉuĉu, mi amas vin. Ambaŭ ni forkuru el tiu nigra sufokejo!

— Ŝŝŝ! Ne bruu, grimpu sur mian dorson, malantaŭe. Tiru la supran stangon kaj turnu la duan dekstran radeton tre, tre milde, por ke neniu rimarku nian foriĝon.

La lokomotiveto, kiu bone konis ĉiujn trakojn, kaŝe zigzagis inter grandaj stultaj vagonaroj kaj baldaŭ atingis la ĉirkaŭurbajn kvartalojn.

Vidante la unuajn herbejojn, Ĉuĉu ekspiris plenpulme, gaje fajfis kaj ekkuregis per ĉiuj fortoj. La eta poeto firme kroĉiĝis al apogrelo kaj laŭte deklamis kun flirtantaj haroj:

— Saluton, Libereco! Min ŝirmu viaj brakoj,
Dum Ĉuĉu rapidegas sur nekonataj trakoj.

La sorto aŭdis lian preĝon. Ambaŭ fakte ne rajtis resti pli longe sur tiu danĝera trafikplena vojo. Ili okaze trovis malnovan trakon, forlasitan de la fervoja administracio pro ekonomiaj kialoj.





Tra kverkaro ili alvenis al pitoreska valo, kie kelkaj bovinoj miris pri tiu erarvaganta lokomotivo. Post la freneza kurado Ĉuĉu deziris iom ripozi kaj haltis meze de vasta sunbrila herbejo. La eta poeto saltis malsupren kaj sterniĝis inter ebriigaj printempaj floroj. Li tiris sian ĉapelon sur la nazon, kaj, aŭskultante la regulan dutaktan spiradon de Ĉuĉu, li feliĉe ekdormis.

Diskreta tut-tut vekis lin.

— Amiko, ni veturu plu.

— Atendu, kara mia. Mi tuj revenos.

La eta poeto rapide kolektis en apuda kampo bukedon da papavetoj, per kiu li ornamis la fumtubon de la ĉarma lokomotivo. Ĉuĉu suspiris:

— Ŝŝŝ, unuafoje iu donacis al mi florojn.

— Ilia ruĝo bele konvenas al via koloro.

— Ha, kial vi tiel dorlotas min?

— Ĉu vi estas feliĉa?

— Jes, hodiaŭ estis la plej bela tago en mia lokomotiva vivo. Sed ne nur pri la tago, ankaŭ pri la nokto ni pensu. Kie ni pasigos ĝin?

— Ie ajn ni certe trovos plaĉan, kvietan lokon.

Efektive, post kelkaj mejloj, ambaŭ amikoj trafis komfortan refuĝejon apud forlasita stacidometo, iam destinita por la lignokomerco. La reloj rustiĝis sed tamen taŭgis por bona ripozo. Estis ankaŭ tempo por vespermanĝo. La lokomotivo decidis atendi ĝis la morgaŭo, por gluti sian kutiman kvanton da karbo. La eta poeto, kiel ĉiuj poetoj, malsatis, sed li sciis, ke poetoj facile anstataŭigas mankantan provianton per profunda dormo. Tiel okazis, kaj la steloj baldaŭ ekbrilis super niaj du kune kuŝantaj feliĉuloj.

Ve! karaj infanoj, plena feliĉo malofte daŭras longe. Dum tiu nokto proksimiĝis la fino de la bela aventuro. Frumatene du ĝendarmoj malmilde skuis la etan poeton kaj katenis liajn manojn. Nekonata fervojisto jam senkompate pelis la lokomotiveton returne al la malgaja urba stacidomo. La eta poeto kriis:

— Ĉuĉu! Ĉuĉu! Kie vi estas?

Li aŭdis nur malproksiman korŝiran adiaŭon: tut-tut, kaj nenion plu.



La ĝendarmoj kondukis lin en malliberejon, en kiu li komencis grati sur muro la odon promesitan al Ĉuĉu. La postan matenon li aperis antaŭ juĝisto, kiu akuzis lin pri ŝtelo de ŝtata havaĵo. Ne komprenante pri kio temas kaj pensante nur pri sia kara lokomotiveto, la eta poeto ĝemis:

— Ĉu, Ĉuĉu, ĉiu juĝu pri nia ĵusa fuĝo?
Ĉi ĉio estis, ĉu ne?, nur serĉo al rifuĝo.

La juĝisto, kiu estis beletrema, tuj sentis, ke antaŭ li staras vera poeto. Poetoj eble ŝtelas korojn, sed neniam lokomotivojn. Cetere la fervoja administracio mem kulpas, ne sufiĉe prigardante sian materialon. Sekve frivola senokupa lokomotivo povas facile delogi senpekan poeton. La klarvida juĝisto do absolvis kaj liberigis la akuziton.

Nun, karaj infanoj, vi eble deziras scii tion, kio poste okazis. Mia kuzo Hematopo raportis, ke la eta poeto malfermis en la urbo kurson de Esperanto. Li instruas belan, eteran, poezian Esperanton, kaj liaj lernantoj siavice ekparolas verse. Tio klarigas, ke nun estas tiom da poetoj en nia movado.

Tiu idealisma okupo certe ne riĉigas la etan poeton, sed tamen restas al li sufiĉe da mono por aĉeti ĉiudimanĉe bukedeton, antaŭ ol direkti siajn paŝojn al la stacidomo.

LA KAPAŬSKULTILOJ

FOJE juĝistoj decidis organizi internacian konferencon en nia regiono.

Tiun novaĵon mi tute hazarde eksciis, sidante en ĉerizarbo malantaŭ la forĝejo. Estis tagmezo. La suno brilis. La forĝisto forlasis martelon kaj balgoblovilon, por manĝi kun sia familio. Ankaŭ mi trankvile pikpikis maturajn ĉerizojn, aŭskultante tra malfermita fenestro la radioinformojn. Kiam oni anoncis la konferencon de la juĝistoj, mi pensis, ke oni verŝajne bezonos miajn servojn, kiel kutime, kiam okazas internaciaj kunvenoj en nia regiono. Mi viŝis mian bekon kaj flugis al la distrikta delegito, samideano Rubeno. Samideano Rubeno loĝas en la dua domo de la urbo, apenaŭ unu mejlon de mia nesto. Lia edzino, ĵus reveninte de trabutikado, bonvenigis min:

— Saluton, verda pigo. Kio nova en via vilaĝo?

— Nenio. Male mi aŭdis, ke en la urbo okazos internacia konferenco.

— Ĝuste tial mia edzo forestas. Sed mi avertas vin: tiu afero malbonhumorigis lin.

— Kial?

— Ĉar la kongresanoj rifuzas uzi Esperanton.

— Ĉu? Kiel do ili sin komprenos reciproke?

— Laŭdire per mikrofonoj kaj kapaŭskultiloj.

Mi, simpla pigo, tiam ne sciis, kio estas simultana tradukado. S-ino Rubeno klarigis al mi, ke interpretistoj pli malpli lerte transigas vortojn de unu lingvo en alian tra mikrofono. La tradukitaĵo enoreliĝas per paro da aŭskultiloj, kiun ĉiu ĉeestanto metas sur sian kapon. Mi ekkriis:

— Ho ve! vere komplika estas la homaro! Tia fuŝmiksilo povas funkcii nur en speciala salono. Kiel konversacias la kompatindul-

oj dum paŭzoj, promenoj, manĝoj, privataj renkontiĝoj? Krome la aparataro certe kostas multege da mono.

— Jes, vi pravas. Ha, estas pli da prudento en la kapo de verda pigo ol en la cerbo de pseŭdofakuloj.

Antaŭ ol reflugi al la vilaĝo, mi decidis viziti la kongresejon. Tra vazistaso mi penetris en la malplenan salonon kaj prenis kapaŭskultilon, intencante esplori tiun diablaĵon en mia nesto.

Mi jam diris al vi, ke ni pigoj estas kolektemaj. Kiel la homoj ornamas siajn hejmojn per pentraĵoj, belaj mebloj kaj tapiŝoj, tiel ni pigoj ŝatas brilajn objektojn. Okazis, ke juna pigino vizitis min du tagojn post mia reveno, por babili kun mi. Tiu enviema snobino ekvidis la aŭskultilon pendantan super mia loĝejo kaj tuj deziris posedi similan dekoracion. Genia ideo trafulmis mian kapon: mi, simpla pigo, kapablas malorganizi la konferencon de la juĝistoj.

Kompleze mi indikis al mia najbarino la adreson, kie oni trovas aŭskultilojn. Poste mi vizitis la nestojn kaj veprojn ekde la vilaĝo ĝis la arbarorando, montrante al ĉiuj gepigoj la admirindan, facile akireblan ornamaĵon. Dum la sekvantaj tagoj la loĝantoj de la apuda urbo miris pri tiom da pigoj svarmantaj super iliaj domoj. La ornitologoj vane konsultis sian fakan literaturon. Pri tiu fenomeno sciis nur unu homo, samideano Rubeno, al kiu mi klarigis la tutan aferon.

Komence la delegito hezitis, parolis pri la morala aspekto de la problemo. Mi ne bone komprenis, kion li aludas, precipe kiam li diris: "Oni fine ne riproĉu al pigoj esti pigoj". Komplikaj estas ja la homoj, iafoje eĉ la esperantistoj. Ba, ni, inteligentaj birdoj, ne rompu al ni la kapon pri ilia nelogika pensmaniero.

Post unu semajno, kiam mi revizitis samideanon Rubeno, lia vizaĝo radiis de ĝojo:

— Ha, verda pigo, dankon. Mi bedaŭras, ke vi mem ne ĉeestis la fiaskon de la konferenco. Mi rakontu ĝin al vi. La juĝistoj plendis, ke mankas aŭskultiloj, por kompreni la gravajn paroladojn de alilandaj kolegoj. La direktoro ne kapablis klarigi la maleston de tiuj iloj, kaj la interpretistoj senhelpe sidis en siaj ĉeloj. Ĵurnalisto sugestis, ke la juristaj moŝtoj, lerninte dum multaj jar-

E

oj la latinan kaj la anglan, uzu tiujn lingvojn por sia interkompreniĝo. Kelkaj provis. Ankoraŭ hodiaŭ mi ridas ĝis larmoj, kiam mi memoras la postan tumulton. Aŭdante kriojn el la kongresejo, multaj pasantoj ariĝis antaŭ la pordo. Junaj esperantistoj, kiujn mi antaŭe kunvokis, informis la scivolulojn pri la babela konfuzo de la juĝistoj kaj disdonis propagandajn flugfoliojn. Kiam la eminentaj juristoj senorde eliris, moka ridego trafis ilin, kaj la homamaso ĥore skandis: "Esperanto! Esperanto!". Ha, kiel bela sukceso! Verda pigo, dankon, dankon.

Kontenta pri tiu rezulto, mi reflugis al mia nesto, cerbumante pri efika disvastigo de mia eltrovo. Artikolo en HEROLDO certe atentigus aliajn pigojn en la mondo pri la ekzisto de belaj kapaŭskultiloj.

LA RIBELEMA KRURO

FOJE japano decidis lerni Esperanton. La nomo de tiu inteligenta junulo estis Takata. Unuavide Takata agis kiel miloj da samlandanoj, kaj mi ne mencius tian ordinaran aferon, se mia kuzo Hematopo ne estus raportinta al mi la strangajn cirkonstancojn de lia esperantistiĝo. Hematopo, serioza marpigo, ĵuris al mi, ke ĉiuj detaloj de la rakonto estas veraj. Bonvolu do, karaj infanoj, aŭskulti ilin.

Kiam Takata anoncis sian intencon lerni la Lingvon Internacian, lia dekstra kruro protestis:

— Mi estas bona japana kruro. Al mi sufiĉas mia japaneco.

Takata miris:

— Amata kruro, ĉiuj miaj membroj kaj organoj ĝojas, pensante, ke ili baldaŭ konos la vastan mondon.

— Ĉu vere?

— Jes, la cerbo, la okuloj, la buŝo, la nazo, la stomako, la brakoj kaj precipe la koro povas nur profiti de la spertoj de siaj alilandaj samuloj.

— Tia kosmopoliteco tute ne plaĉas al mi.

— Demandu do vian ĝemelon, la maldekstran kruron.

— Ho ho, la opinio de estaĵo maldekstra estas ege suspektinda. Por mi gravas nur mia amo al la patrujo. Memoru, ke vi mem edukis min tiel.

— Ĉu mi?

— Jes.

— Kion vi fantazias?

— Nenion mi fantazias. Antaŭ sep jaroj vi faris vian militservon. Ĉu vi forgesis la ĉiutagan marŝadon en la kazerna korto? "Un' du! Un' du!" skandis la serĝento. Ho, kiel belan voĉon havis la serĝento! Mi bedaŭras, ke tiu trejnado finiĝis. Kaj la muziko, ha, la entuziasmiga muziko!

— Kara kruro, memoru, ke post la milito mi ofte kondukis vin al koncertoj, en kiuj vi povis ĝui veran, universalan arton muzikan. Vi ja ne komparu la kazernan klarionon kun la naŭa simfonio de Betoveno aŭ la senmortaj operoj de Vagnero.

— Diru kion vi volas, sed mi rifuzas lerni Esperanton!

— Vi lernos Esperanton!

— Mi ne lernos Esperanton!

Kion fari, kiam obstina kruro ne volas lerni Esperanton? Takata jen minacis, jen flatis, jen batis, jen ruzis. Vane. Dum la sekvantaj tagoj la dekstra kruro kondutis kaj deĵoris normale. Ĝi laboris, paŝis, promenis, vagis, saltis, dancis akorde kun la maldekstra kruro. Sed, ĉiufoje kiam Takata sciigis sian intencon viziti la Esperanto-kurson, la ribelema kruro rigidiĝis kaj ŝajnigis sin morta. La kompatinda lernanto devis do treni ĝin kvazaŭ pezan ŝtipon, kaj tio vere malfaciligis al li la studadon de la Lingvo Internacia. Des pli merita estis post unu jaro lia akiro de la Supera Atesto pri Lernado.

Kiam Takata unuafoje partoprenis en interkonatiĝa vespero de Universala Kongreso, multaj samideanoj miris, vidante la junulon salteti per unu piedo, hop hop! Kelkaj kredis, ke temas pri nova reklama metodo, kaj usona delegito proponis la adopton de tiu japana tekniko: se ĉiuj esperantistoj en la mondo saltetus per unu piedo, hop hop!, la ĵurnalistoj pli ofte ol nun informus la publikon pri nia grava afero.

Takata, klariginte la kialon de sia hopado, naskis ĝeneralan disreviĝon. La apudestantoj malfide ekobservis la kuriozan krurон kaj superŝutis la japanon per ĉiaj konsiloj: oni faligu dikan ŝtonon sur la stultan piedon, oni trempu la malican membron en bolanta akvo, oni amputu ĝin...

Aj! Takata protestis, ke la kruro estas lia kruro kaj ke li ne lernis Esperanton por fariĝi kriplulo. Tiam juna germanino alproksimiĝis al la japano kaj flustris:

— Venu kun mi. Mia edzo sidas tie, en angulo, kaj deziras paroli kun vi.

Takata ĝentile klinis sin antaŭ la germano, kiu diris:

— Saluton. Mia nomo estas Teo. Mi ĵus aŭdis la konversacion

pri viaj malfacilaĵoj. Bonvolu sidiĝi apud mi. Ankaŭ mi havis problemojn koncerne mian dekstran kruron.

— Ĉu?

— Jes, rigardu.

Teo suprenlevis krurumon de sia pantalono. Aperis metala protezo. Ambaŭ junuloj rigardis sin silente. La germano grimacis:

— La milito...

Takata murmuris, levante la ŝultrojn:

— Jes, la milito. Ankaŭ mi devis fari ĝin. Feliĉe mi revenis kun ambaŭ kruroj.

Teo ridetis:

— Mi revenis viva... kun preskaŭ ĉiuj membroj. Dum longaj semajnoj, sur mia hospitala lito, mi kriis pro doloro. Post kiam kirurgo lerte kunflikis miajn karnajn ŝirpecojn, mi decidis krii mian amon al la paco, kaj, por konvinki kiel eble plej multajn homojn en la mondo, ke la milito estas abomeninda, mi lernis Esperanton.

Takata suspiris:

— Tasko nobla sed malfacila. Kiam surduloj rifuzas aŭdi...

Teo ameme rigardis sian edzinon kaj deklaris:

— Ni jam konvertis multajn surdulojn, ĉu ne, Erika?

Ŝi kapjesis, ridetante:

— Ni estas nekuraceblaj optimistoj.

La germano gaje frapis la dekstran femuron de la japano:

— Venu, amiko. Ni iru kune trinki glason je la prospero de la paco kaj de la internacia amikeco.

Brako en brako, kun Erika en la mezo, la triopo malrapide elriis el la salono.

Teo lamis pro sia protezo. Male Takata paŝis tute normale.

Tio pruvas, laŭ mia birda vidpunkto, ke ankaŭ simpla homa kruro iafoje kapablas prudentiĝi.

IENTO

ZOZO, LA DEKSEPA REGULO DE LA FUNDAMENTO

FOJE f-ino Regultri, la tria regulo de la Fundamento, diris al sia kolegino f-ino Regulsep:

— Venu, ni iru iom promeni.

F-ino Regulsep hezitis:

— Ni ne rajtas forlasi la Fundamenton. Vi scias, ke s-ro d-ro Lavojo, la prezidanto de la Akademio, malpermesis tion.

— Ba, s-ro Lavojo estas malsana kaj kuŝas en fora sanatorio. Ni profitu lian maleston kaj ĝuu la liberecon.

F-ino Regultri malfermis la pordon de la Fundamento kaj elir-is. Ŝin sekvis eksteren ne nur f-ino Regulsep, sed ĉiuj ceteraj reg-uloj ekde f-ino Regulunu ĝis f-ino Reguldekses.

Kiam mi vidis ilin ĉe la vojkruciĝo de la Granda Fago, komence mi ne rekonis ilin. Kutime la dek ses fraŭlinoj promenis ĉiudim-anĉe en bona ordo, po du en vico, kaj s-ro d-ro Lavojo fiere paŝis poste, severe observante ilian disciplinon. Je la priparolata tago de sia aventura forkuro, ili male aspektis kaj kondutis kiel svarmo da sturnoj. La subita libereco ebriigis ilin. Ili pepis, ridis, petolis, interpuŝiĝis, ne konjektante la danĝerojn minacantajn tiajn fren-ezulinetojn.

Fakte, post kelkaj mejloj, ili renkontis fremdan regulon, kiu afable salutis ilin:

— Bonan matenon, koleginoj. Kien vi iras?

Ili haltis kaj respondis:

— Ni nur iom ekskursas en la ĉirkaŭaĵo de la Fundamento.

— Ho, mi bone konas la Fundamenton kaj volonte apartenus al ĝi.

F-ino Regulses, la plej granda, rimarkigis:

— Bedaŭrinde ni rajtas esti nur dek ses, ne pli.

— Kiu ordonis tion?


17
8
3
4
6

— Nia patro, d-ro Zamenhof.

— Ba, d-ro Zamenhof mortis antaŭ multaj jaroj. Se li ankoraŭ vivus, li certe adoptus min kiel deksepan filinon.

— Kion do vi kapablas fari?

La fremda regulo ŝveligis la bruston, tusetis kaj asertis aplombe:

— Per mi Esperanto estus ankoraŭ pli facila. Oni nomas min Zozo. Kial? Tial ke oni povas en frazo anstataŭigi per *zozo* ĉiun nekonatan aŭ forgesitan vorton.

La dek ses Fundamentaninoj rigardis sin konsternite kaj ĥore kriis:

— Ni ne komprenas.

Zozo ridetis:

— Karaj koleginoj, mi funkcias kiel ĵokero en ludo. Ni supozu ekzemple, ke iu forgesis aŭ ankoraŭ ne lernis la vorton "ombrelo". Li simple diras: "Kiam pluvas, mi prenas mian zozon". Se li ne konas la verbon "fumi", li diras: "Mi zozas cigaredon". Same ĉiu klare komprenus jenajn frazojn:

— Mano havas kvin zozojn.

— Por saluti vin, mi demetas mian zozon.

— Ĉu vi flue zozas Esperanton?

— Ŝi bone zozas pianon.

— Ĉu vi fartas zoze aŭ malzoze? ktp.

Konfesu, ke tiu solvo faciligas la konversacion. Finita la balbutado de multaj samideanoj. Ĉu mankas vorto? Hop! Zozo ensaltas kaj helpas.

F-ino Reguldekkvar prudente atentigis, ke ŝi mem ludas similan rolon per la prepozicio *je*, kiu povas anstataŭi ĉiujn prepoziciojn.

Zozo kapjesis kaj emfazis:

— Jes, sed la rolo de *zozo* estas ankoraŭ pli grava, ĉar ĝi kapablas anstataŭi ĉiujn radikojn. Do, se vi afable akceptus min en vian familion, mi fariĝus f-ino Reguldeksep kaj la deksepa regulo de la Fundamento tekstus: "Kiam parolanto de la lingvo Esperanto ne scias vorton, li simple uzu anstataŭe la radikon *zoz*, kiu memstaran signifon ne havas".

Ĉiuj aplaŭdis krom f-ino Reguldekses, kiu energie protestis:

9

— Ne, ne! La tuta mondo scias, ke Esperanto havas dek ses regulojn. Sanktaj kaj definitivaj estas iuj nombroj: tri gracioj, kvar sezonoj, sep tagoj en semajno, naŭ muzoj, dek du monatoj en jaro, mil kaj unu noktoj ktp. Ne, ne! Mi estu por ĉiam la lasta regulo de la Fundamento.

Post mallonga silento Zozo proponis:

— Se mi vere ne povas fariĝi f-ino Reguldeksep, eble malgrava regulo de la Fundamento devus cedi al mi sian lokon.

Ĉies rigardoj turnis sin al f-ino Regulnaŭ. Kun pala vizaĝo kaj tremantaj kruroj ŝi staris malantaŭ siaj koleginoj kaj subite eksploris. Zozo severe demandis ŝin:

— Por kio vi servas en la Fundamento, f-ino Regulnaŭ?

F-ino Regulnaŭ balbutis:

— D-ro Zamenhof konfidis al mi la gardadon de jena leĝo: "Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita".

Zozo rikanis:

— Mi ja respektas d-ron Zamenhof, sed li estis verŝajne laca, kiam li inventis tiun superfluan regulon. Kial li ne preskribis same: "Por paroli Esperanton, oni malfermu la buŝon" aŭ "Por lavi siajn piedojn, bona esperantisto demetu siajn ŝuojn"?

Tiom da sprito tiel ridigis la ceterajn regulojn, ke ili senkompate forlasis f-inon Regulnaŭ en angulo de arbaro kaj transdonis ŝian lokon al la fremda, senhonta regulo.

Zozo persvadis siajn naivajn koleginojn tuj reiri en la urbon kaj komisii al presisto la eldonadon de nova Fundamento. Sekve multaj homoj tiam eklernis sensuspekte la dek ses regulojn, inkluzive la nezamenhofan naŭan: "Kiam parolanto de la lingvo Esperanto ne scias vorton, li simple uzu anstataŭe la radikon *zoz*, kiu memstaran signifon ne havas".

Kio baldaŭ okazis? Babelo inter la esperantistoj mem: la Lingvo Internacia, la plej klara lingvo en la mondo, fariĝis nenomebla ĵargonaĉo, terura galimatio, ankoraŭ pli nekomprenebla ol Volapük. Neniu lernanto penis parkerigi vortojn. Ĉiu ĉiam ĉie ĉiel uzis la lingvan ĵokeron.

Iu procesis kontraŭ iu, pretekste ke tiu lin insulte nomis zozego.

Aŭtoj karambolis, tial ke neniu sciis, ĉu "zoza" signifas "ruĝa" aŭ "verda", "dekstra" aŭ "maldekstra".

Policano enkarcerigis pasanton, kiu surstrate kriis: "Zozu la prezidanto!".

Komercistoj bankrotis, ĉar ili ricevis mendoleterojn, kiuj tekstis proksimume: "Estimata zozo, zoze zozinte vian zozon de la 3a de aprilo, mi zozas tujan prizozon de alia zozaĵo, ktp."

La sola homo, kiun entuziasmigis la nova naŭa regulo estis la ĉefredaktoro de avangarda beletra revuo. Al senmorta versaĵo de li, titolita "ZOZO", la sep abonantoj de la revuo aljuĝis premion por la plej elstara ĉefverko de la jaro. Mi ankoraŭ bone memoras la komencon de tiu poemo:

Zozo zozo zozo
zozo zoz'!

Feliĉe la zoza periodo de Esperanto daŭris nur du monatojn. La kompatinda forĵetita regulo de la Fundamento petveturis al la fora sanatorio de d-ro Lavojo. Kiam la resaniĝanta prezidanto de la Akademio ekvidis f-inon Regulnaŭ, li preskaŭ sufokiĝis:

— Kio? Vi ĉi tie? Sola? Kie estas viaj kunulinoj?

F-ino Regulnaŭ murmuris:

— Ili eksigis min.

— Kion vi diris?

— Ili eksigis min.

La prezidanto demetis sian piĵamon, surmetis sian akademianan uniformon, kaptis valizon per la maldekstra mano, f-inon Regulnaŭ per la dekstra mano kaj galopis al la stacidomo.

Dumvojaĝe li petis de ŝi detalan raporton pri la katastrofa situacio. Liaj okuloj fulmis, kaj li senĉese grumblis:

— Oni vere ne rajtas malsaniĝi. Ha, idiotinoj! Ha, perfidaj porkinoj!

La kunveno en la granda salono de la Fundamento restos por ĉiam unu el la plej tumultaj momentoj en nia historio. La prezidanta voĉo tondris kaj tremigis la murojn. Zozo kaŝis sin malantaŭ la hontoplenaj, teruritaj, plorĝemantaj reguloj kaj provis piedpinte eskapi merititan punon, sed d-ro Lavojo haltigis ŝin:

— Vi! jes, vi! Alproksimiĝu!

17

Zozo paliĝis.

— Vi profitis mian maleston, por konfuzi la harmonian aranĝon de nia Esperanto. Fi al vi! Tuj malaperu aŭ vi ricevos piedbaton sur vian, sur vian...

Ŝi nesaĝe balbutis:

— Sur mian zozon?

Kun ruĝa vizaĝo li furioze blekis plengorĝe:

— Sur vian postaĵon!

Zozo forkuris. La Lingvo Internacia iom post iom reakiris sian kutiman klarecon. Okaze de la Librotago oni ĵetis en grandan ĝojofajron ĉiujn ekzemplerojn de la falsa Fundamento, krom unu, kiun pie konservas la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno.

LA LINGVO INTERPLANEDA

FOJE, antaŭ proksimume dek monatoj, min vekis nekutima bruado. Mi elrigardis super la randon de mia nesto kaj vidis en la pala lumo de la tagiĝo leporan paron forkuri, kvazaŭ ĉiuj ĉashundoj de la vilaĝo persekutus ĝin. Diversaj krakoj, susuroj kaj zumoj montris, ke io eksterordinara perturbis la ritmon de la vivo en nia regiono. Ĉiuj bestoj kune fuĝis antaŭ nevidebla danĝero. Maljuna korniko preterflugis mian neston, grakante: "Alarm', alarm'!", kaj poste peza silento falis sur la ebenaĵon.

Pensante, ke brulego kaŭzis tian panikon, kiel antaŭ sep jaroj, mi rapidis en la direkto al la arbarorando. Post nur dudeko da flugilbatoj, tra nebuleto vatanta la malsupran parton de la herbejo, apud la rivereto, mi distingis grandan,rondan, metalan objekton.

Ĝi estis tute simple unu el tiuj kosmoŝipoj, kiujn la homoj nomas flugantaj teleroj. Jam kvar fojojn antaŭe mi vidis tiajn fenomenaĵojn en la ĉielo, sed neniam sur la tero. Mi alproksimiĝis kaj, per singardaj paŝetoj en la roso, ĉirkaŭiris la fremdan spacveturilon, senmove pendantan unu metron super la grundo. Ĝia ŝelo brilis bluete, kvazaŭ lumigata de ekstere, kaj mallaŭta zumado ŝajnis eliĝi el anteno fiksita meze de la ronda tegmento.

Subite, kvankam neniu aperturo malfermiĝis en la kosmoŝipo, antaŭ mi staris stranga estaĵo apenaŭ pli granda ol mi. Terurite, mi volis forflugi, sed mi sentis min paralizita de aparato ĵetanta blindigajn radiojn. Mi diras "aparato", tial ke mankas al mi la ĝustaj vortoj, por priskribi la vizaĝon de tiu vizitanto el alia mondo. Tio estis verŝajne lia okulo. Sur lia kapo longa tentaklo senĉese vibris. Li havis kvar brakojn antaŭe kaj du malantaŭe. Li moviĝis sur tri kruroj, kaj akutaj sonoj ŝprucis el truo, supozeble lia buŝo, lokita meze de la ventro. La tuta haŭto estis kovrita de verdaj haroj.

Mi diris al mi:

— Oj! stulta pigo, via scivolemo pereigos vin. Kial vi ne fuĝis kune kun viaj najbaroj? Baldaŭ vi alvenos en Kukolnublando.

Kukolnublando estas la paradizo de la birdoj laŭ raporto de mia kuzo Lanio, kiu aŭdis tion de fama greka ornitologo, Aristofano, se mi bone memoras.

Tiam, karaj infanoj, kredu min, mi ja tute ne pensis pri Aristofano. Miaj plumoj hirtiĝis, mia beko timklakis, kaj mi atendis rezignacie la fatalan atakon de la eksterterano. Sed, kiel vi konstatas, mi ankoraŭ vivas kaj povas do rakonti al vi sperton, kiu enviigus multajn sciencistojn.

Per kvar manoj la kosmoŝipano tenis antaŭ mia beko luman tabuleton, sur kiu, premante butonojn, li aperigis kaj malaperigis nekonatajn signojn. Mi havis la impreson, ke li provas komprenigi sin per diversaj lingvoj. Bedaŭrinde mi devis nee skuadi la kapon, ĝis kiam mi legis sur la tabuleto:

1 + 1

Mia beko aŭtomate klakis dufoje. La ventra buŝo eligis laŭtajn sonojn iel similajn al homa ridego. Mia testanto evidente konstatis kun plezuro, ke mia birda pensosistemo estas logika. Poste li frapetis sian tabuleton, kvazaŭ li invitus min mem uzi ĝin, por konversacii kun li. Per la pinto de mia beko mi skribis:

— Mi estas pigo.

Li manipulis ŝaltilon verŝajne rezervitan por logikaj operacioj. Mia frazo tuj transformiĝis en signojn de lia kosma lingvo. Lia kapa tentaklo agitiĝis. Li repremis butonon, kaj sur la tabuleto aperis jenaj vortoj:

— Mi estas ikso ipsilono 117.

Neatendite staris du aliaj figuroj sub la fluganta telero. Ikso ipsilono 117 turnis sin al ili, lia tentaklo tremetis, dum sonora knarado eliĝis el lia ventra buŝo.

Ŝajne li petis ilin sin prezenti al mi, ĉar mi baldaŭ povis legi iliajn nomojn: vo kuo 234 kaj zo ikso 806.

Post tiu interkonatiĝo komenciĝis interesega konversacio pere de la luma tabuleto. Pripensu, infanoj, la historian karakteron de tiu evento: unuafoje loĝantoj de malproksima planedo interrilatis


1+1

kun terano en nia distrikto, en nia ebenaĵo, apenaŭ unu duonan mejlon for de ĉi tiu poplo. Ke la terano ne estis homo, sed nur simpla pigo, tion oni evidente ŝuldas al mia esperantisteco. Fakte la tri kunuloj raportis al mi, ke ili jam renkontis homojn okaze de pli fruaj surteriĝoj, sed tiuj senflugilaj dukruruloj ŝajnis al ili neinteligentaj estaĵoj pro siaj nekompreneblaj sensencaj blekoj. Male mian klaran, logikan, regulan, racian Esperanton la luma tabuleto tiel facile glutis kaj deĉifris kiel matematikan formulon.

Ni babilis dum la tuta tago, kiel malnovaj amikoj, pri gravaĵoj kaj bagateloj. Mi ne komprenis ĉion, kion ili aperigis sur la luma tabuleto. Oni memoru, ke ilia mondo estas tute alia. Ankaŭ mi ne sukcesis klarigi al ili terajn nociojn pri spaco kaj tempo. Efektive, kiom estas unu kilometro, kiom estas unu horo por estaĵoj moviĝantaj en la universo pli rapide ol fulmo? Same tiaj vortoj, kiaj ŝtato, nacio, patrujo, limo, partio, politiko, milito estis vere netradukeblaj. Mi eĉ hontis, kiam ili demandis min, kial ne ĉiuj homoj parolas klaran lingvon, kiel mi. Ĉu mi, simpla pigo, denuncu al eksterteranoj la stultecon de multaj teranoj?

Mi ĵuris al mi, ke mi intelekte pli bone prepariĝos por eventualaj estontaj diskutoj kun kosmanoj. Demandinte miajn amikojn, kiam ili revenos en nian regionon, mi ricevis respondon konsistantan el multaj ciferoj, kiujn mi ne kapablis interpreti. Ikso ipsilono 117 kaj liaj kolegoj eble reaperos post du tagoj aŭ du monatoj. Se ili male atendos ducent jarojn, ili ne trovos min ĉe la rendevuejo. Hi hi, mi jam de longe estos en Kukolnublando, la birda paradizo.

Vespere la fremduloj petis min malproksimiĝi, ĉar la supreniro de la ŝipo endanĝerigus mian vivon. Mi do reflugis al mia nesto, de kie mi baldaŭ vidis lumstrion pafiĝi kaj sveni inter la stelojn. Mi murmuris: "Adiaŭ".

La postan matenon la leteristo raportis en ĉiu vizitata domo, ke li observis flugantan teleron super la vilaĝo. La homoj ne kontraŭparolis al li, sed ili opiniis, ke troa drinkado ofte naskas halucinojn. Ankaŭ se mi rakontus al ili mian travivaĵon, ili rikanus: "Kion fantazias tiu maljuna pigo?".

Do, karaj infanoj, nur vi scias la veron, kaj, kredu min, se iu el vi iam deziros farîĝi kosmonaŭto, li diligente studu la matematikon, sed li ĉefe ellernu Esperanton, lingvon interplanedan.

LA STRANGA HISTORIO DE NOTULAS

FOJE, en la familio Reber, naskiĝis ĝemeloj, Anna kaj Otto. Anna venis en la mondon tute normale. Male Otto montris unue siajn piedojn. La akuŝistino timis, ke la bebo mortos, sed, kiam la kapo fine aperis, forta krio pruvis la intencon de la nova hometo firme okupi sian lokon sur la tero.

S-ino Reber amegis siajn ĝemelojn, kiuj kreskis feliĉaj en la gepatra domo. Kiam la infanoj lernis paŝi, oni miris, ke Otto emas retroiri. Estas ja danĝere iri dorsdirekte, ĉar oni ne vidas la vojon, sed Anna ĉiam restis apud sia frato kaj atentis, ke li ne falu en fosaĵon aŭ en kuvon.

En la unuaj monatoj, la knabineto komencis, kiel ĉiuj infanoj, balbuti "paĉjo", "panjo" kaj aliajn simplajn vortojn. Male Otto elparolis nur sensencajn frazojn.

Iam la patrino demandis sian edzon:

— Ĉu Otto eble estas surda?

Li trankviligis ŝin:

— Certe ne, kara. Li bone aŭdas, kiam ni vokas lin. Atentu.

Tra la fenestro rigardanta al la ĝardeno, kie la ĝemeloj ludis, la patro laŭte demandis:

— Kiu volas ĉokoladon?

La knabeto tuj ekstaris kaj retropaŝe ŝanceliĝis, sekvate de Anna, kiu ankaŭ alkuris sur siaj etaj kruroj. Ambaŭ infanoj ĝoje frandis la ĉokoladon, dum la patro ridetis al la patrino:

— Nu, ĉu vi estas konvinkita?

Ŝi suspiris mallaŭte:

— Ha, espereble lia menso ne suferis pro la nenormala nasko.

— Ne, kara. Vi jam rimarkis, ke Otto ĉion tiel bone komprenas kiel Anna. Li ankoraŭ ne kapablas klare esprimi siajn sentojn, sed ĉiuj infanoj ne kreskas egale, kaj li certe baldaŭ kompensos tiun malfruiĝon.

Post tri aŭ kvar jaroj estis kurioze ĉeesti konversacion inter ambaŭ ĝemeloj. Kvankam Otto parolis en sia stranga lingvo, Anna klare komprenis, kion li diras. Ŝi respondis en bona Esperanto. Li uzis plu sian idiomon, ŝi denove Esperanton, kaj tiel daŭris la eksterordinara dialogo.

La gepatroj estis perpleksaj. Kiam ili demandis la knabeton pri lia nomo, li korekte respondis: "Otto Reber". Li ankaŭ povis voki "Anna", sed liajn ceterajn vortojn aŭ frazojn ili ne komprenis. Lia fratino devis interpreti liajn parolojn. Ŝi estis tiam tro juna, por klarigi al si tian fenomenon, ke ŝi kapablas kapti la sencon de vortoj fremdaj por plenkreskuloj.

Kiam ambaŭ infanoj renkontis aliajn, Otto simple diris:

— Notulas.

Tio ridigis ilin, kaj ili alnomis la kompatindulon Notulas. Otto ĉagreniĝis pro la mokado kaj ne volis iri sola sen Anna. Ŝi skoldis la mokantojn kaj raportis al la gepatroj, ke senhontaj buboj nomaĉas ŝian fraton Notulas.

Precipe la patrinon afliktis tia traktado de ŝia amata ido. La vilaĝa kuracisto preskribis diversajn tablojdojn kaj siropojn. Senrezulte. Li konsilis al ges-roj Reber sin turni al prof-ro Kredumin, mondfama specialisto pri paroldifektoj. Otto estis proksimume sepjara, kiam liaj gepatroj kondukis lin en la urbon, por konsulti prof-ron Kredumin. La knabo salutis la eminentan fakulon:

— Notulas.

— Kion vi diris?

— Notulas.

— Kion signifas tio?

— Notulas.

— En kiu lingvo vi parolas?

— Etnarepse.

La medicinisto rigardis ges-rojn Reber kaj demandis:

— Ĉu estis indiano inter viaj prapatroj?

Ili levis la ŝultrojn kaj asertis, ke neniu familiano iam estis en Ameriko.

Prof-ro Kredumin iom meditis, kaptis dikan libron el sia biblioteko, legis du minutojn en ĝi, deprenis siajn okulvitrojn kaj deklaris:

— La kazo de via filo estas klara: temas pri kunpremo de la tria cerba pedunklo, kiu kaŭzas malvigliĝon de la hipofizo kaj sekve estigas kion Hipokrato nomis dislalio.

Ges-roj Reber ne komprenis tiun ĵargonon. La patrino preskaŭ eksploris. La patro demandis, ĉu ilia infano estas sanigebla. La profesoro hezitis:

— Dislalio ĝenerale postulas longan kuracadon. Bonvolu reveni venontan semajnon, kaj ni komencos taŭgan terapion.

Senkuraĝiĝinte, ges-roj Reber reiris hejmen kun Otto.

Jam de pluraj jaroj mi aŭdis pri la kompatinda Notulas. Mi vidis lin nur du aŭ tri fojojn, silente sidanta apud sia fratino Anna. Mi scias, ke li ne volonte venis al miaj poplaj kunvenoj, ĉar li timis la mokadon de aliaj infanoj pro lia retropaŝado kaj liaj nekompreneblaj frazoj.

Kiam Lanio, mia klera kuzo el Ateno, min vizitis, mi demandis lin, kion signifas la vorto dislalio. Lanio respondis:

— Dislalio estas greklingve tute simple "parolmalfacileco".

Mi indigne protestis:

— Kio! Maltrankvilaj gepatroj prezentas sian infanon al kuracisto, kaj li ne kuraĝas konfesi sian nescion, sed male ĵetas al ili polvon en la okulojn. Ha, Hipokrato malbenu tiun hipokritulon, kiu diras: "Se via filo malfacile parolas, tio devenas de parolmalfacileco"!

— Jes, kara kuzo, sed li diras ĝin greke.

— Ĉarlatanaĵo! Tiu fia Kredumin neniam sukcesos kuraci la knabon.

— Ba, ofte estas pli saĝe lasi la naturon agi mem.

Du tagojn poste, dum flugado inter veproj, mi remaĉis tiujn grizajn pensojn, kiam mi renkontis la bonan feinon Amenta.

— Saluton, verda pigo. Kial vi mienas ĉagrene? Ĉu vi estas malsana?

— Tute ne, kara feino. Malgraŭ mia aĝo mi sentas min bone. Sed mi kompatas junan vilaĝanon, kiu suferas strangan sorton.

La feino sidiĝis sur herbo apud mi, kiel simpla homo kaj diris:

— Rakontu al mi ĉiujn detalojn. Eble mi povos helpi lin.

Mi fidele raportis pri la ĝemeloj Anna kaj Otto Reber. Amenta

iom meditis, elpoŝigis notlibreton, foliumis ĝin kaj ridetis. Mi senpacience demandis:

— Nu, kara feino?

— En la dekkvina jarcento mi solvis similan problemon. Ĉu vi havas spegulon?

Mirante, mi malfermis la bekon. La feino ripetis:

— Ĉu vi havas spegulon?

— Kiam mi estis juna kaj koketa, mi ĉiam havis unu aŭ du spegulojn en mia nesto. Nun...

— Kaj kiun vi vidis en la spegulo, kiam vi rigardis vin en ĝi?

— Kompreneble min.

— Ne ĝuste vin, sed vin inverse. Via dekstra okulo estis la maldekstra en la spegulo, via maldekstra flugilo estis la dekstra, ktp.

— Jes, certe.

— Nu, tia reflekta fenomeno iafoje, verdire tre malofte, okazas ĉe ĝemeloj. Ili aspektas similaj, sed unu estas nur kvazaŭ spegulita figuro de la alia. Sekve, kiam unu kliniĝas dekstren, la alia kliniĝas maldekstren; kiam la unua antaŭeniras, la dua retropaŝas; se Anna diras "patro", Otto diras "ortap", ktp.

— Oj! kial mi ne eltrovis pli frue, ke "notulas" signifas "salut-on"? Sed, kara feino, memoru, ke la knabo normale prononcas la nomojn Otto kaj Anna.

Malicete la feino Amenta rimarkigis al mi, ke Otto, Anna kaj Reber estas hazarde legeblaj kaj elparoleblaj ambaŭdirekte. Mi skuis la kapon kaj ĝemis:

— Ha, mi estas vere stulta pigo, preskaŭ tiel stulta kiel homo.

Amenta indulge trankviligis min kaj serioze aldiris:

— Nun mi serĉu la kontraŭrimedon.

Ŝi denove foliumis sian notlibreton, kaj ŝia vizaĝo baldaŭ heliĝis.

— Estas simple. Mi agos kiel tiam, en la dekkvina jarcento. Kiam ĝemelo faranta ĉion inverse renkontas estaĵon kondutantan kiel li, li tuj iĝas normala. Montru al mi, kie loĝas la ĝemeloj.

Mi flugis al la domo de ges-roj Reber, kaj Amenta ŝvebis malantaŭ mi. Ŝi alteriĝis, prononcis magian formulon kaj tuj aliformiĝis en belan fraŭlinon. Post kiam ŝi kaŝis sian sorĉovergon

en sian mansaketon, ŝi aspektis kiel normala elegantulino. Beke mi frapis sur vitron de la ĉambro, en kiu ludis la ĝemeloj. Poste mi rapide forflugis kaj kaŝis min sur ĝardena muro, trans la strato. Scivoleme la infanoj malfermis la fenestron kaj elrigardis. Ili vidis nur belan sinjorinon, kiu malrapide paŝis kaj repaŝis antaŭ ilia domo. Ĉar la ĉambro situis en la teretaĝo, Anna kaj Otto longe observis la fremdulinon, mirante, ke ŝi retropaŝas, kiel Otto. Anna suspektis ion eksterkutiman. Ŝia frato sentis kvazaŭ brulon en la brusto. Li fariĝis maltrankvila. Subite la bela sinjorino haltis antaŭ la fenestro, alridetis lin kaj diris:

— Notulas, Otto. Leik iv satraf?

Otto gapis al ŝi dum momento kaj poste kriis:

— Saluton, sinjorino. Mi fartas bone.

Anna kuris el la ĉambro, vokante:

— Paĉjo, panjo! Otto parolas.

Ges-roj Reber rigardis sian filinon:

— Kion vi rakontas?

— Jes, Otto parolas.

La patro restis muta de surprizo, la patrino faligis sian trikaĵon kaj ne kredis siajn orelojn, kiam la knabo envenis, murmurante:

— Panjo!

Plorante kaj ridante, ŝi premis la fileton al sia koro, dum li ripetadis:

— Panjo, panjo!

La patro provis kvietigi la filinon, kiu brue dancis tra la ĉambro, kantante:

— Otto, Otto, Otto. Dankon, sinjorino.

— Pri kiu sinjorino vi parolas?

Anna ĉesigis sian saltadon kaj raportis pri la bela fremdulino, kiu konversaciis kun ŝia frato en lia kutima lingvo.

— Jes, paĉjo, kaj poste Otto parolis kiel vi kaj mi.

La gepatroj kuris el la domo, sed ili vidis neniun ekstere. Jam de longe Amenta ŝvebis aliloken, kie oni povas bezoni ŝiajn servojn. Ili reeniris, cerbumante pri tiu nekredeblaĵo. S-ino Reber murmuris:

— Eble tiu sinjorino estas feino.
Ŝia edzo kompate skuis la kapon, moketante ŝin:
— Kion vi imagas, kara? Ha ha, feino! En nia jarcento!

ONIF